

N° 193  
janvier  
février  
mars  
2021

# LA INFORMILO

N° 193  
januaro  
februaro  
marto  
2021

l'espéranto  
la langue de l'amitié  
sans frontières



## ESPERANTO FRANCE-EST

association culturelle  
pour la promotion  
de la langue  
internationale

## ESPERANTO

regroupant

les départements

Bas-Rhin (67)

Haut-Rhin (68)

Meurthe-et-Moselle (54)

Meuse (55)

Moselle (57)

Vosges (88)

Maison des Jeunes

et de la Culture

"Philippe Desforges"

27, rue de la République

FR-54000 NANCY

=====

ABONNEMENT / ABONO

Papera versio: 18 €

Reta abono: 7,50 €



## Babilejo

- Bastien Lacour: kiel malakceligi roboton tra tiom maldikan atmosferon?
- Klaus Dijkstra: Estas sukcesaj misioj kaj estas misioj (pardonu, mi ne povis retiri min)
- biciklanto: bona vortuldo ●
- Rogier Huurman: Ĉu Perseverance povos veturi al la surgrundiĝo de Beagle?
- Eterna krokodilanto: saluton
- Eterna krokodilanto: ni neniam povos loĝi en Marso ●
- Eterna krokodilanto: la gravito tie ne bonas por ni
- Eterna krokodilanto: ni devas serĉi planedojn en aliaj sistemoj
- Eterna krokodilanto: cxar en la nia ne estas aliaj planedoj por vivi tie
- An Ollslagers: Kiam la Perseverance estas lanĉita?
- Christel Rouffier: Momente aŭvenis eĉ tri misioj en la Marso orbito. Tio certe ne estas hazardo?
- Pedro Tiago: Mi ankoraŭ atendas la unuan virinon sur lunol
- Gesti Meado: Vi parolis pri „pulvo“ - ĉu pulvo ne estas por paŝi? Ĉu vi celis polvo? Aŭ ĉu mi eraras?

## En direct vers la planète Mars avec l'espéranto!

En 2003 Loïc ROSSI a appris l'espéranto en suivant un cours en ligne. Il fait maintenant partie des jeunes scientifiques qui

œuvrent pour la promotion de l'espéranto dans les sciences. Ainsi les espérantophones de la planète ont pu l'entendre commenter en direct et en espéranto le voyage de l'engin

spatial PERSEVERANCE vers la planète

Mars: <https://www.youtube.com/watch?v=ZrG8udYeJxU>

Nos lecteurs, espérantophones ou non,

peuvent faire la connaissance de Loïc ROSSI sur le site:

**esperanto-aktiv** de l'association **Espéranto-France.**




## Spite al la koronaviruso la grupa Esperanto-vivo pli kaj pli buntas

**La lokaj Esperanto-grupoj estas aparte forte frapitaj** per la ekonomia fermo pro la koronaviruso. Aliflanke la virtuala Esperanto-mondo momente montras tute novajn facetojn, eĉ pli buntajn, eĉ pli interesajn.

En Baden-Virtembergo minimume du grupoj *,obstine kaj virtuale'* daŭrigas siajn kunvenojn: **Stuttgart** (2-foje monate: je la unua lundo kaj je la tria mardo, ambaŭ je la 19a30 per *Jitsi*) kaj **Freiburg** (ĉiu-semajne, ĉiam lunde je la 20a per *Zoom*).

Kio estas aparte interesa pri tiaj *,kunsidoj'*: estas pli kaj pli internacia partoprenado en tiaj video-konferencoj. Ekzemple en Freiburg jam partoprenis homoj el Francio, Italio, Hispanio, Pollando, Irano kaj Anglio. Por ke **vi mem** ricevu inviton, bv. skribi letereton al Julia.Noe<@>esperanto.de

Se vi volas viziti unu el tiaj virtualaj renkontiĝoj, vi konsultu la retpaĝon <[eventaservo.org](http://eventaservo.org)>. Tie vi trovos ĉiujn bezonatajn informojn, ĉu kaj kiel aliĝi kaj kiam kaj kiel partopreni virtualan renkontiĝon.



Vendrede vespere la Londona kaj Antverpena kluboj proponas prelegojn, kun plej ofte pli ol 70 partoprenantoj. Post la prelego eblas fari demandojn al la preleganto. Poste sekvas libera babilado inter la ĉeestantoj

Krome plej ofte tiuj prelegoj estas registritaj kaj reaŝkulteblaj ĉe jutubo-kanaloj. En la retejo de EFE troviĝas la ligoj al ĉiuj prelegoj.

Eblas peti aliĝon al tiaj kunvenoj ĉe: [renato.corsetti@gmail.com](mailto:renato.corsetti@gmail.com)



## Kiel ripari ekonomie kloakan galerion

AKVO, trinkebla akvo: ne preter-havebla akvo! Tiom da popoloj en la mondo malhavas ĝin! En niaj riĉaj landoj, sufiĉas turni kranon kaj eblas sen plia zorgo duŝi, prepari manĝon, poste lavi la teleraron aŭ la vestaron. Kaj eĉ foje priakvumi sian ĝardenon.

Sed, ĉu la uzantoj de akvo konscias pri la tuta laboro necesa por ricevi tiun valoran trinkeblan akvon? Unue oni ĉerpas akvon el subtera akvo-tavoloj aŭ el valdigoj<sup>1</sup>. La urbo Saint-Etienne [Sentetjen] mastrumas 3, el kiuj la plej malproksima situas je pli ol 50 km. Sed ekzistas ankaŭ aliaj valdigoj de komunumoj en la ĉirkaŭo. La tuto estas nun administrata de la *Metropolo Saint-Etienne*, vasta aro da 53 komunumoj, kreita en 2017.



**Bildo 1:** la akvo-ciklo

Ekde tiuj valdigoj, necesas konduki tiujn akvojn per prem-duktoj (t.e. kun premo pli alta ol atmosfero) ĝis la stacio de trinkebla akvo-produktado. Tiu-ĉi situas en la kvartalo *Solaure* [Solor] almonde de la urbo. Ĝia celo estas igi la akvon trinkebla kaj klare travidebla per diversaj traktadoj.

**Noto 1:** La 3 valdigoj estis sinsekve konstruitaj : **Le Gouffre d'Enfer** (1866) ; **Le Pas de Riot** (1878) kaj la valdigo **La Valette** en najbara departamento (1910) Ili estas konstante kontrolitaj kaj bontenitaj.

Feliĉe la akvo de Saint-Etienne devenas de montaro, ĝi enhavas tre malmulte da kalko kaj ne necesigas pezan traktadon, kiel en Bretonio (okcidente de Francio) pro la nitratoj. Estas notinde, ke tiu uzino produktas grandan parton de sia elektro-konsumado, dank'al siaj turbinoj.

La **provizado de trinkebla akvo** al domoj kaj kvartaloj efektiviĝas per aro da tuboj (la **akvo-reto**) kiun necesas konstante bonteni. La urbo Saint-Etienne konsistas el multaj kvartaloj je diversaj altecoj, inter 650 m kaj 470 m. Ĉu ne estas dirate, ke simile al Romo, ĝi estas la urbo kun 7 montetoj? Poste, estas la reto de **kloakaj galerioj**, kunligitaj al la rivero *Furan*<sup>2</sup> [Fŭran] kiu alkondukas la uzitajn akvojn (ankaŭ la pluv-akvojn) al la puriga stacio *Furania* [Fŭranja] ĉe la nordo kaj alvalde de la urbo.

### Inundoj

De 1991 la administradon de l'akvo en Saint-Etienne regas privata societo, la *Stéphanoise des Eaux* [stefanaj akvoj]. Ĝi devis realigi multajn laborojn. ekzemple krei novan sistemon por limigi inundojn en la malalta



parto de la urbo: dum fortaj fulmo-tondroj, la kvartalo *Bergson* [Bergson] estis ofte inundita (ĝis 20 cm sur la ŝoseo!) Sistemo regata per informadika KP (komand-punkto), nomata INFLUX, ebligas regi la fluojn (mezuritaj en m<sup>3</sup>/sek): Laŭ la veter-prognozoj kaj la trafitaj kvartaloj, eblas antaŭvidi kaj malrapidigi la fluojn en iuj kanalizacioj por ebligi al la saturitaj kanalizacioj evakui la troajn fluojn. Tio do efektiviĝas de 2015, fermante aŭ malfermante *elektro-pordetojn*<sup>3</sup>, muntitajn sur kanalizacioj. [ĉi-dekstre: **kluz-pordetoj** sur tuboj]

**Noto 2** La tutan urbon transiras torento, nomata *La Furano*, kiu estas komplete kovrita kaj al kiu kunligiĝas la kloakaj kanalizacioj.

**Noto 3:** Kio estas *kluz-pordeto*? Termino de aparato kun movebla parto, kiu ebligas fermi aŭ malfermi trapason kun celo malebligi aŭ reguligi la fluson. [PIV]

Evidente la bontenigaj laboroj neniam finiĝas, ĉu por urĝaj agadoj, kiel neatendita rompiĝo de trinkebla akvo-tubo, ĉu por laboroj delonge antaŭviditaj, cele al plu-tenado de la reto en bona stato.

Tiel, antaŭ ol krei novan tram-linion, kiu pasis tra la urbocentro en 2006, necesis unue malfermi profundan tranĉeon, sur Placo de la Popolo, kio grave ĝenis la trafikon!

Estis tiam necese kovri la galerion de *La Furano* per fortika strukturo el armita betono, kiu subtenu la pezon de la novaj tramoj.



**Bildo 2:** Malmultaj konscias, ke sub la tramo fluas la Fŭrano? Dekstre, *Place du Peuple* [Placo de la Popolo]

Kelkaj kloakaj retoj datiĝas de jam 150 jaroj. Antaŭ nelonge unu el tiaj galerioj situanta sub la Placo de la Urbodomo, kaŭzis grandajn zorgojn. La volbo el masonitaj ŝtonoj nepre bezonis plifortikigadon! Sed oni hezitis malfermi tranĉeon sur tiu centra placo (kun

konsekvencoj de gravaj trafik-perturboj) ĝenoj kaj damaĝoj al la grundo-vestiĝo de mallonge renovigita. Plie aldoniĝus grandegaj kostoj!

La Kompanio de Stefanaj Akvoj sin demandis: Kiel ripari la volbon de tiu galerio? Ĝi havis ideon: uzi la teknikon de *ĉemizado* per **polimerigita gaino**. Pri kio temas?

Oni uzas simplan kloakan lukon por enŝovi longan bendon, ŝmiritan per rezino. Ĝi prezentiĝas sub formo de longa tubo (17,5 mm dika) kien oni povu injekti aeron. La gaino estos poste tirata el alia kloaka lukto. Tiu agado postulas iom da lerteco por ne difekti la tuban bendon. Oni nomas ĝin iom slange *ŝtrumpeto*! Por povi trankvile labori palisaroj ŝirmas de scivolemuloj!



**Bildo 3:** Dungitoj de la Kompanio Stefanaj Akvoj enŝovas gainon tra kloakan lukon. La flava rimeno utilos por ĝin tiri de alia lukto. .

Ĉu vere tiu laboro estis nepre necesa? Ni nur observu la staton de la volbo antaŭ la agado: tiu masonaĵo, tipa de la 19a jarcento, konsistas el volbo, certe muntita sur ŝelo. Inter ŝtonoj la morteraĵoj jam ekmalaperis.



**Bildo 4:** La origina volbo, kies multaj juntoj estis restaŭrendaj. Notu la rezinan bendotubon sur speciala aranĝo kontraŭlika.

Sur la 4a bildo, la longa rezina tubo (maksimume 25 m) estas jam tirata laŭlonge de la galerio, kiu kondukas al la subtera Fŭrano. Nune necesas injekti aeron enen, por ke ĝi prenu la

formon de la galerio. Tuj poste, ĝi estos hejtgata ĝis 140°C per serio da varmigaj lampoj. Dank'al la varmo, la polimerigado de la gaino akiras rigidan strukturon. Tiaj laboroj prezentis multajn avantaĝojn: la galerio



**Bildo 5:** Aspekto de la galerio post volba formado de la rezina tubo.

estas plifortikigita kiel antaŭvidite. La teknika direktoro, sinjoro *Gravelais* [gravle] substrekas tiun fakton "*Ĉar la surfaco estas glata, ĝi faciligas hidraŭlikan elfluadon*". Sed, ĉefe, dank'al tiu tekniko ili evitis malfermi 50-metrojn longan tranĉeon sur la Urbodoma Placo. Por tio estus necesinta stopi la tramojn, fari ir-revenojn por forpreni la rubaĵojn, rekonstrui la tutan surfaceton, ktp! La daŭro de la laboro tial forte reduktiĝis: 10 tagoj anstataŭ 7 ĝis 8 semajnoj!

Finkalkulante, oni ŝparas tempon, monon, kaj damaĝojn. Legante la ĵurnalon, la urbaj impost-pagantoj ne plendos!



**Bildo 6:** Dum la subteraj laboroj, la urbodoma Placo restis trankvila kun sia konk fontano kaj sia karuselo!

#### Fontoj:

1. Artikolo en la ĵurnalo La Tribune /Le Progrès 28/08/2020
2. Kompanio Stéphanoise des eaux Bildoj 1; 3; 4; 5 (kun kopi-raĵto]
3. Propraj fotoj de TAKE: Bildoj 2 kaj 6

Ni speciale varme dankas al s-ro Gravelais kaj lia kunlaborantino s-ino Feracci pro la helpo kaj la klarigoj, kiujn ili afable provizis al ni per video-konferenco. Ĉeesta kunveno maleblis pro la kron-viruso!

Pierre Grollemund

## Informoj pri TAKE

### Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistaj.

Ni havas la plezuron informi vin, ke la fak-asocio TAKE ĵus sukcesis aperigi sian jaran revuon

#### "KONSTRUADO-kajero de TAKE 2021".

Ĉi-apude troviĝas la titoloj de la diversaj artikoloj de la ĉi-jara numero.

La ĉefa temo rilatas al "akvo". Tio estas tre vasta temo, kiu povus plenigi plurajn numerojn. Luj rilatas al diversaj landoj Brazilo, Respubliko de Kongo.

Ĝuste en tiu lando, dank'al kunordigado kun esperantistoj de la asocio AVE, la projekto pri akvo-provizado en Kalima progresis.

Pri arkitekturo aperas artikolo pri la altega turo de Miami, kies kolonojn desegnis la fama arkitektino Zaha Hadid.

Claude Bensimon daŭrigas sian priskribon de arkitektura konceptado kun klarigoj pri la ora nombro.

## ENHAVO

### Titolo

- 1 Enkonduko
- 2 Teknikoj por atingo de pura akvo kaj higieno por ĉiuj
- 3 Trinkebla akvo en Kalima
- 4 Novaj esperoj en Kalima
- 5 Harmonio en arkitekturo : La ora nombro
- 6 Reguligaj desegnaĵoj
- 7 La "Modulo" de Le Corbusier
- 8 Kiel ripari ekonomie kloakan galerion
- 9 La turo Skorpio en Miami
- 10 Setlejo en Bezannes
- 11 Baroka Juvelo
- 12 Hoho, ligna alta domo en Vieno
- 13 Ŝpariga necesejo
- 14 Jan Werner konstru-inĝeniero



Ĉiuj membroj de TAKE ricevas la ĉi-jaran eldonaĵon **"KONSTRUADO-kajero de TAKE 2021"**, Laŭ la ĉi-subaj tarifoj eblas membriĝi al la fak-asocio TAKE kaj ricevi la ĉi-jaran broŝuron.

Ankaŭ eblas mendi antaŭajn numerojn de **"KONSTRUADO-kajero"** kaj de **"Jarkolektoj"**.

Nia redaktoro Pierre Grollemund volonte povas akcepti viajn proponojn aŭ eĉ viajn kontribuadojn por venontaj numeroj. Bonvolu tiam rilati kun li: [verdapigo@gmail.com](mailto:verdapigo@gmail.com)

La komitato de TAKE

KOTIZOJ AL TAKE	2021	2022	2023
Normala kotizo	9 eŭroj	9 eŭroj	9 eŭroj
Subtena kotizo	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
Ĉiuj membroj ricevos en 2021	La KONSTRUADO-kajeron TAKE (ampleksa teknika kajero)		
Eblas mendi antaŭajn numerojn por la jenaj jaroj: Mendo de 1 ekzemplero: 9 eŭroj	Konstruado-kajeroj 2021 2020 2019 2018 2017 2016 Jarkolektoj: 2015 2012 2011 2010 2009 2008 2007 2006		
Pago en Francio	Per ĝiro al TAKE: <b>Poŝt-banko:</b> CCP 2 549 46 A Strasbourg Per sendo de franca ĉeko en eŭroj je la nomo de TAKE-Esperanto, al André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM Francio		
Pago Internacie	Internacia ĝiro al TAKE: IBAN: FR58 2004 1010 1502 5494 6A03 650 BIC: PSSTFRPPSTR		
Pago pere de UEA-konto	Per ĝiro al la UEA-konto de TAKE: ekat-i Bonvolu sam-okaze informi pri via pago al: <a href="mailto:andreo.ag16@sfr.fr">andreo.ag16@sfr.fr</a>		

Legante du aŭtobiografiajn verkojn de la rusa verkisto Maxim GORKI, en kiuj li rakontas sian infanaĝon kaj postan junaĝon, mi dum la tuta legado malkovris, kiom violento, eĉ krueleco, regis en la tiamaj ĉiutagaj homaj interrilatoj. La aŭtoro atentigas mem la legantojn kelk-paragrafe en la lasta parto de ambaŭ libroj. Tiujn eltiraĵojn mi tradukis al Esperanto kaj proponas al vi ĉi-sube. Pri GORKI mem vi ankaŭ iometon ekscios. Eble mi tiel instigos vin, scii iom pli pri li.

E. L.

Mia infanaĝo  
1913 – 1914

***Dum mi revivigas tiujn plumbo-pezajn abomenaĵojn de la malkultura rusa vivo, mi de tempo al tempo min demandas, ĉu indas paroli pri tiuj aferoj. Kaj plenfide mi respondas: jes, indas, ĉar daŭre restas viva malĝoja realo tio, kion mi tie rakontas, realo kiu ankaŭ aktuale daŭre viglas kun sia krudeco kaj kiun oni nepre ekkonu ĝis en sian radikon kaj kiun necesegas ŝiri inkluzive de ties radikoj el la konscio, el la animo de nia popolo, el nia tuta mucida, hontiga vivo.***

***Kaj krome mi havas duan pozitivan kialon por rakonti tiujn abomenaĵojn: eĉ se ili estas tiel hidaj, eĉ se ili tiom pezas, eĉ se ili detruas kaj frakasas tiom da noblaj animoj, la rusa homo laŭ-kore tiom sanegas kaj junas, ke li/ŝi ilin supervenkas kaj ilin daŭre supervenkos.***

***Ne nur tiom mirigas pri nia vivo, ke en ĝi la tavolo de la krudeco, de la besta abomenado ankoraŭ tiom grasas kaj dikas, sed ankaŭ ke tra tiu tavolo, eĉ se ĝi tiom dikas, ĝin triumfe tra-kreskas la homa bonkoreco, saneco kaj kreativeco kaj tenas veka la neneŝanceblan esperon je renaskiĝo de bela, lumplena, vere homa estado.***

Inter fremdaj homoj 1915 – 1916

Mi sentis neesprimitan malemon kontraŭ akcidentoj kaj malsanoj, kontraŭ ĉia plendado kaj lamentado. Kiam mi estis atestanto de kruelaj agoj – kun sango, interbataladoj, iu nura parola mokego – min surfalis korpa naŭzo, kiu rapide sin transformis en profundan koleron. Mi kutimis interbatiĝi kiel la aliaj, mi luktis kiel sovaĝa besto kaj poste mi min honte turmentis.

Foje min kaptis tia emo forte bati la turmentiston kaj mi min ĵetis tiel blinde en la interbatadon, ke aktuale mi daŭre ĝene kaj honte memoras pri tiuj eksplodoj de malespero naskiĝintaj pro senpoveco.

Du homoj vivis ene de mi: unu estis (post kiam li vidintis tro da fiaĵoj kaj malpuraĵoj) iom timema kaj li alfrontis la vivon kaj la homojn plena de malfida suspekto kaj de senpova kompato ankaŭ por si mem, senkuraĝigita pro siaj ĉiutagaj scioj kaj teruraĵoj. Ĉi homo revis pri trankvila soleca vivo kun libroj kaj for de la homoj, revis pri monaĥejo, pri forst- aŭ relvoj-gardista dometo, pri Persujo aŭ posteno de nokto-gardisto ie ajn rando de la urbo. Nur malmultaj homoj kaj kiel eble plej for de ili...

La alia, influita de la Sankta Spirito kaj de saĝaj libroj, sentis – kiam li observis la superpotencan forton de la ĉiutagaj teruraĵoj – kiel facile tiu forto kapablus rezultigi senkapigon, kiel facile ĝi povus piede dispremi lian koron kaj li defendis sin kontraŭ ĝi kun kunpremitaj dentoj kaj per pugnoj, preta por ĉiu ajn kverelo, por ĉiu ajn batalo. Tiu aliulo pruvis sian amon, sian kompaton per ago, kiel tio indas por brava heroo en franca romano, kiu elingigis post ĉiu tria parolo sian spadon kaj sin pretigis por la batalo.

***Tre koncizigitan biografion de Maxim GORKI ni loku post ambaŭ eltiraĵoj. Ĝi post ties lego atentigu pri la konstatoj dum la du unuaj jardekoj de lia vivo kaj pri la vivo de la sama homo, kiam li iĝis mond-konata verkisto kaj devis lukti por fideli al idealo de pli-feliĉigo de la rusa popolo malgraŭ la tsara polico kaj la posta de li frue kaj longe subtenata komunista sistemo, kontraŭ kies abomenaĵoj li senpovis, eĉ suferis pro oftaj minacoj. Lin pli ol unu fojon savis lia tut-monda famo.***

**BIOGRAFIO:** Maxim GORKI fakte nomiĝis Alexei Maximowitsch PESCHKOW. Li kreskis en plej malriĉaj viv-kondiĉoj, en epoko, kiam la povreco de la popolaro en Rusio iĝis grava temo en la literaturaj kaj sociaj disputoj. Lia avo estis haŭlisto ĉe la rivero Wolga, lia patro estis meblisto. Post la frua morto de la patro la juna Aleksei ekloĝis kun sia patrino ĉe la geavoj. Violento ene de la familio ĉiutagis. Kiam li iĝis dekjara lia patrino forpasis pro tuberkulozo kaj la avo tri jarojn poste lin elprenis el la lernejo.

Ekde de tiam Peŝkow estis devigata perlabori sian monon mem, unue kiel ĉifon-kolektisto. Antaŭ ol esti kapabla



Maxim GORKI (1868 – 1936)  
Du eltiraĵoj el liaj aŭtobiografiaj verkoj  
*Mia junaĝo 1913/1914*  
*Inter fremdaj homoj 1915/1916*

vivi per sia literatura verkado, li laboris interalie kiel kur-knabo, kuireja komizo, birdo-vendisto, pentristo de ikonoj, malŝarĝisto de ŝipoj, pan-bakista laboristo, masonisto, nokto-gardisto, fervojisto kaj helpanto de advokato.

En la malfruaj 1880-aj jaroj li iris al Kazan, kie li sensukcese klopodis esti akceptata en la universitato. Tie li unuafoje havis kontakton kun la revolucia movado. Li laboris ĉe pan-bakisto, kies vendejo samtempe ŝirmis bibliotekon de marksista sekreta klubo.

Peŝkow multe legis kaj akiris memlernade vastajn, sed nesistemajn sciojn. La nesuperebla abismo inter li kaj la studanta junularo lin perturbis kaj plej verŝajne estis la kialo por provo de memmortigo en 1887, kiam li pafis al sia brusto. Sed plej verŝajne ankaŭ la morto de liaj geavoj tiu-jare kaj nereciproka amo povus esti kialoj.

Gorki pli kaj pli rebelis kontraŭ la tsaro, estis plurfoje arestita, sed intertempe li jam internacie konatis pro sia literaturaj sukcesoj. Li longtempe ekziliĝis, vojaĝis tra pluraj landoj kaj de 1907 ĝis 1913 li vivis sur la sud-itala insulo Capri.

Li pli kaj pli klopodis antaŭenigi la revolucion, konatiĝis kun Lenin, la kreinto de Rusa Komunista Partio, sed ĉar Gorki estis nepre religia, la rilatoj malprokimiĝis ilin. Okazis repaciĝoj. En 1913 la tsaro amnistiis lin kaj li revenis al Rusio.

Rea opono al Lenin okazis okaze de la Oktobra Revolucio, ĉar Gorki deziris socian revolucion kaj krome estimis, ke la rusa popolo ankoraŭ ne maturis por revolucio, por ke ili povu unue konscii, ke ĝi sin mem eligu el la mizero.

Dum la rusa komunista periodo Gorki zigzagis inter subteno de komunismo kaj iniciatoj, kiuj ne kongruis kun la komunista sistemo. En 1921 kaj 1922 li vivis denove longe en Italio, Ĉeĥio (Marienbad) kaj en Germanio – inter alie pro tuberkulozo en la sanatorio de la transrejna Münstertal, en Sankt-Blasien, poste ankaŭ en Günstertal apud Frajburgo.

Post la morto de Lenin (1924) li unue ne volis reveni al Sovetunio, ĉar li ne aprecis la novan registaran skipon, sed en 1927 li tamen revenis, daŭre observata de la sekreta polico. Li sukcesis plu-verki kaj estis uzata de la reĝimo kiel standardo.

La germana aktoro Klaus Mann, frato de la germana verkisto Thomas Mann, partoprenis en 1934 kongreson de sovetaj verkistoj en Moskvo kaj estis invitita en la domo de Gorki. Li deklaris poste: “La poeto, kiu konis ekstreman malriĉecon, la plej teruran mizeron kaj tion rakontis, loĝis en princa lukso; la sinjorinoj de lia familio nin akceptis vestitaj laŭ Pariza modo; la manĝo sur lia tablo estis azie abunda. . . . Poste oni proponis multe da vodko kaj da kaviaro”.

Gorki forpasis en 1936. Multis la rakontoj pri lia morto, ĉu natura, ĉu post murdo? Eĉ dum la stalinaj procesoj eksta ĉefo de la sekretaj servoj estis akuzita... Sed finfine oni supozas, ke li mortis pro malsano.

En 1933 en Germanio la verkoj de Gorki estis elprenitaj el la bibliotekoj kaj bruligitaj.

## ESPERANTO-FIRMAO DOMOVAR

La firmao DOMOVAR situas apud Colmar (68) kaj komercas per varoj pordomaj. El tio venas ĝia nomo (DOMOVAR),

En tiu societo oni uzas ankaŭ esperanton de tempo al tempo. Jen kelkaj ekzemploj:

Tuj post la komenco de la pandemio mankis maskoj en Francio, netroveblaj aŭ tre kostaj, do ni provis rapide trovi maskojn en Ĉinio (Anhui) pere de Esperanto. Rapide ni ricevis ofertojn de du firmaoj kaj ni subskribis la kontrakton en Esperanto. Post 3 semajnoj ni ricevis la unuuzajn maskojn. Certe ni esperantigis la klarigojn, uzmanieron: esperanto + franca lingvo. Ni ricevis 10.000 maskojn, kiuj estis venditaj en unu monato.

Ĉar kun plezuro ni povis uzi Esperanton en tiu komercado, ni decidis donaci po unu centimo je vendita masko por UMEA (Universala Medicina Esperanto Asocio).

Tiel ni povis donaci malgrandan sumon de 100 eŭroj al ili. Certe ni aĉetas dank'al Esperanto ankaŭ gantojn por laboristoj, ilojn.

Lastjare - ĉar ni havis petojn pri aĉeto de polento - ni studis kun la itala produktisto, ĉu eblas fari etiketon ankaŭ en Esperanto. Ili akceptis, kvankam neniu en la produktanta muelejo “Antico Molino Rosso” estis esperantisto. Ni aĉetis 500 belajn saketojn de biologia tujpreta polento (faruno de maizo), kaj ĉio vendiĝis en la daŭro de ses monatoj. Ni refaros tion.

Estas interese uzi kaj krei novajn terminojn, vortojn por ĉiutaga tekniko en Esperanto !

Nun ni provas komerci per aliaj biologiaj manĝeblaj varoj ĉefe el Italio. Jam eblas havi ilin, sed nur kun etiketoj en la itala. Se ni sukcesas vendi pli da tiaj varoj, ni aldonos Esperanton,

La firmaoj konstatas, ke Esperanto estas taksata kiel ajna alia lingvo. Se oni sukcesas aĉeti grandkvante, ili volonte akceptas uzi Esperanton por vendi !



<b>Espéranto France-Est</b> http://esperanto.france.est.free.fr.				<b>Orient-Franca Esperanto-Asocio.</b>	
<b>La Informilo</b>		Bulletin bilingue d'information sur la langue internationale <b>ESPERANTO</b>		Dulingva inform-bulteno pri la internacia lingvo <b>ESPERANTO</b>	
<b>Rédaction:</b> <b>Redaktoro:</b>		Edmond Ludwig kaj André Grossmann		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM	
Les articles à insérer doivent parvenir impérativement à la rédaction dans les délais suivants:		Article manuscrit à éviter Texte envoyé par courriel doc, odt Document avec mise en page (PDF) marges identiques à cette page-ci		un mois 3 semaines 2 semaines avant la fin de chaque trimestre	
Les articles signés nommément par leurs auteurs expriment la seule opinion de ces derniers.					
<b>Komitato de la Asocio</b>			<b>Comité de l'Association</b>		
Funkcio		Adreso		Telefono	
Ret-adreso		Telefono		Ret-adreso	
Prezidanto <i>Président et secrétaire</i>		S-ro Edmond LUDWIG 26, route de la Schlucht 68140 STOSSWIHR		03.89.77.52.56 esperanto.eludwig@orange.fr	
Help-sekretariino <i>Secrétaire-adjointe</i>		S-ino Liliane BERSWEILER 1 chemin du Lacé 54990 XEUILLEY		03.83.47.41.36 06 76 54 77 78 liliber54@yahoo.fr	
Kasisto - Redaktoro <i>Trésorier - Rédacteur</i>		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		09.86.38.78.61 andreo.ag15@sfr.fr	
Libroservo <i>Service Librairie</i> Vic-prezidanto		S-ro Jean-Luc THIBIAS 37, rue Pierre et Marie Curie 54500 VANDOEUVRE		03.83.53.57.54 jean-luc.thibias@laposte.net libroservo.efe@laposte.net	
Aliaj komitatanoj		S-ro Robert KUENY		09.71.31.37.62 kueny.robert@orange.fr	
<i>Assesseurs</i>		S-ino Micheline COLNOT		03.83.27.46.93 michelinecolnot@orange.fr	
		S-ro Jacques HERLÉ		03.87.01.00.39 jacques.herle@laposte.net	
		S-ro Michel Basso		03.89.80.86.12 clbm@orange.fr	
		S-ino Gisèle BERTAPELLE		03.83.56.17.37 06.80.68.94.78 bertapelle.gisele@wanadoo.fr	
		S-ino Catherine HEL		03.83.47.63.07 cathello@laposte.net	
		S-ro Gilbert STAMMBACH		06 87 40 01 16 gilbert.stammach@gmail.com	
<b>Abono al La Informilo</b> →		18 eŭroj		reta abono: 7,50 eŭroj	
← <i>Abonnement à La Informilo</i>					
Pagoj per ĉeko je la nomo de →		<b>Esperanto France-Est</b>		← <i>Paiement par chèque au nom de</i>	
Pagoj per ĝiro al jena konto →		<b>CCP 1997 72 W NANCY</b>		← <i>Paiement par virement au compte</i>	
Per internacia ĝiro →		IBAN: FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC: PSSTFRPPNCY			
Bank- aŭ poŝt-ĉekoj sendataj al la Kasisto Adres-ŝanĝo: Informu al →		S-ro André GROSSMANN 5, rue des Pyrénées 68390 BALDERSHEIM		Chèque bancaire ou postal ou changement ← d'adresse à envoyer au trésorier	
1. Marso kaj Esperanto		15. Katalogo de nia Libro-servo		<b>ISSN 0291 6037 trimestriel</b> <b>N° CPPAP : 0409 G 83517</b> Bulletin d'information bilingue sur l'espéranto édité par l'association culturelle <b>Espéranto France-Est</b> MJC PhiJippe Desforges 27 rue de la République <b>54000 NANCY</b> Directeur de la publication : <b>Edmond LUDWIG</b> Rédacteur provisoire : André Grossmann Dépôt légal : <b>30 septembre 2013</b> <i>Imprimé par l'imprimerie Sprenger</i>	
2. Retaj kunveno en Frajburgo		16. Katalogo de nia Libro-servo			
3. TAKE Kiel ripari kloakon		17. Katalogo de nia Libro-servo			
4. TAKE Kiel ripari kloakon		18-26. Katalogo de nia Libro-servo			
5. Informoj pri TAKE		27. Hector Hodler			
6. Maxim Gorki		28. Hector Hodler			
7. Maxim Gorki + Domovar		29. Hector Hodler			
8. Komitatanoj kaj enhavo		30. ISEA			
9. Angulo + Legantoj		31. ISEA + Morice Bénin			
10. Nia Libro-servo		32. Abonoj kaj kotizoj			
11. Katalogo de nia Libro-servo		33. Enigmoj kaj humuraĵoj			
12. Katalogo de nia Libro-servo		34. Humuraĵoj Laŭra kaj Petro			
13. Katalogo de nia Libro-servo		35. Lingvoj en Francio			
14. Katalogo de nia Libro-servo		36. Foto-paĝo: tra sezonoj			



## ANGULO DE LA PREZIDANTO

**Estimataj samideanoj,**

la suban deklaron de Hektor HODLER mi trovis legante la en tiu LA INFORMILO reklamatan dulingvan (franca-Esperanto) libron pri nia tro june mortinta pioniro:

**.. Oni ankaŭ forlasu la blufon de eminentuloj, sciencaj aŭ registaraj, kiuj okaze ellasis favorajn vortojn pri Esperanto, sed praktike tre malmulte interesiĝas pri ĝi. . . .**

**Hektor Hodler (1887-1920) “Nova tempo, novaj metodoj”, Esperanto n°49, la 20an de februaro 1909 p. 1**

Mi iel konsentas kun li, kiu ĉi-rilate rapide seniluziiĝis. Tamen tiaj favoraj deklaroj nin ebligas iel prestiĝigi nian lingvon, kio-eble – persvados iujn personojn ĝin eklerni, eĉ se aktuale mi havas la impreson, ke ni dronas sub lavavango da paroloj kaj bildoj en la amaskomunikiloj. Tiu lavango ne lasas al la homoj la tempon sin alkroĉi al pripensado, ĉar daŭre tiklas novaj impresoj!!!

Pro tio: legadu gazetojn kaj librojn! Konsultu la katalogon de nia libroservo. Kun plezuro Jean-Luc THIBIAS sendos al vi viajn mendaĵojn. E.L.

**Leteroj de legantoj**

Dankon al André Grossmann pro la redaktado de La INFORMILO. Bonega laboro. Mi ĵus ricevis ĝin per-poŝte. Evidente mi plu abonos, kvankam mi loĝas en Saint-Etienne.

Mi deziris ankaŭ diri mian kontenton pro la paĝo 26 de la Informilo: Raporto pri uzo de mono en RDC, far Alphonse Waseka de Goma! Jes li estas honestulo kaj lia raporto donas fidon al ĉiuj, kiuj helpis kun-financante! Ni povas esti fieraj pro tiuj esperantistoj!

Pierre Grollemund

Kara tuta familio, mi tralegis "GARDU, VIN KNABO" kaj miris pri la riĉega Esperanto, ekzemple la verbo “ĉei “! NENIAM VENUS AL MI TIA IDEO, TIA KOMBINAĴO. . . Plie mia infanaĝo similis al la destino de la herojoj de la verko. . . kaj la lasta frazo tuŝegis min: NUN SEN LIM-ZONAĴO ONI KUNĈEAS SERENECE!!!!!!!!!!!!!!!!!!!! Ĉu iam eksjugoslavaj landoj tiel vivos. ??? TIEL??? Eble miaj pragenepoj Roko kaj Rita.

Kore kaj amike Nevenka IMBERT

**Al mia animo urĝas**

- Mi nombris miajn jarojn kaj konstatis, ke mi havas malpli da tempo por vivi, ol mi vivis ĝis nun.
- Mi sentas min kiel tiu infano, kiu gajnis skatolon da bombonoj:
- La unuajn ĝi manĝas kun plezuro, sed kiam ĝi rimarkas, ke ankoraŭ nur malmultaj restas, ĝi komencas vere ĝui ilin.
- Mi ne havas tempon por senfinaj konferencoj, en kiuj oni priparolas statutojn, regulojn, procedojn kaj internajn preskribojn, sciante, ke oni nenion atingos.
- Mi ne plu havas tempon elteni absurdajn homojn, kiuj spite al sia aĝo ne kreskis.
- Mi ne plu havas tempon, batali kun mezbonecoj.
- Mi ne volas esti en interkonsilaj kunsidoj, en kiuj ŝvelintaj egoj paradas.
- Mi ne eltenas manipulantojn kaj oportunistojn. Ĝenas min la enviantoj, kiuj provas misfamigi pli kapablajn homojn, por akapari ties poziciojn, talentojn kaj sukcesojn.
- Mia tempo estas tro mallonga, por diskuti kapliniojn.
- Mi volas la esencaĵon, ĉar mia animo estas en urĝo sen multaj dolĉaĵoj en la pakaĵo.
- Mi volas vivi kun homoj, kiuj estas tre homecaj,
- homoj, kiuj kapablas ridi pri siaj mankoj, kiuj ne vantas pro siaj sukcesoj, kiuj ne sentas sin destinitaj antaŭtempe kaj kiuj ne fuĝas antaŭ sia respondeco.
- Kiuj defendas la homan dignon kaj kiuj volas iri nur ĉe la flanko de la vero kaj honesteco.
- Estas tio, kio igas la vivon vivovalora.
- Mi volas kolekti ĉirkaŭ mi homojn, kiuj kapablas tuŝi la korojn de aliaj, homojn, kiuj per la severaj batoj de la sorto lernis kreski per teneraj tuŝadoj de la animo.
- Jes, al mi urĝas. Al mi urĝas vivi kun la intenseco, kiun la matureco povas doni.
- Mi provas ne malŝpari iun el la dolĉaĵoj, kiuj ankoraŭ restas al mi.
- Mi certas, ke ili estos pli delicaĵoj ol tiuj, kiujn mi jam manĝis.
- Mia celo estas, atingi la finon kontente, en paco kun mi, miaj karuloj kaj mia konscienco.
- Ni havas du vivojn, kaj la dua komenciĝas, kiam vi ekkonas, ke vi havas nur unu.

*Mario de Andrade (1893-1945)*

*(El la germana tradukis Alois Eder, 20.12.2020. La originalo supozeble estas en la portugala)*



# El nia libroservo

## Informoj



⇒ Kiam la libroservo denove partoprenos komunan aranĝon? Ni ankoraŭ ne scias!  
Nun la Esperanto-movado daŭre vintrumas, kiel granda parto de la mondo!  
Sed ni ne lasu nian kulturon malaperi!

Do la libroservo plilongigas sian oferton ĝis la 30a de junio 2021:

Por aĉeto de iu nombro de libroj proponataj en tiu paĝo kaj en la ĉi aldonita katalogo (se la stoko sufiĉas!), la petita repaĝo de afranko estos:

- por adreso en Francio: maksimume **8 €** (proksimume la prezo por 1 kg) aŭ la plej favora poŝta prezo por malpli pezaj sendaĵoj,

- por adreso en Eŭropa Unio, maksimume **15 €** (aŭ malpli, se ekzistas pli favora poŝta prezo).

⇒ la vendo de libroj ebligas aĉeti nove eldonitajn librojn!

Ni optimismu: la 9a de majo, tago de Eŭropo estu la komenco de reiro al normala vivo!

Ĝis baldaŭ! Jean-Luc Thibias

libroservo.efe@laposte.net



## Novaj libroj

- 1) **La kateĥismo de la katolika Eklezio**, Religio, **Opo**, *Gmeiner*, 2020, 208 p. **15 €**.



Tiu traduko estis farita grandparte de nia samideano Pastro Eichkorn,

- 2) **Stranga malapero**, Infana lernolibro, **Marie Laŭre Lions Oliveri**, *Esperanto France*, 2021, 48p, **9 €**.

Esperantlingva traduko de franca lernolibro. Aventuro en Korsiko tra 6 ĉapitroj ilustritaj kun teksto kaj demandoj pri ĝi,

- 3) **Hector Hodler, pacisma sinteno**, movado, **Marine Englert**, *Notari*, 2020, 232 p, **29 €**

Du lingva libro (franca/esperanta). Vidu la recenzon en la aparta artikolo de tiu-ĉi Informilo...



①

②

③

Sur la postaj paĝoj ni aperigas la katalogon de nia Libroservo. Vi povas forpreni tiujn 16 paĝojn, ilin apartigi kaj faldi por ekhavi broŝureton.

Se vi preferas konservi tiun numeron de La Informilo, tiam ni proponas elŝuti la saman katalogon en formato A4 el nia retejo: <http://esperanto.france.est.free.fr> ĉe libro-servo

### Por mendi librojn:

1. Vi sendas vian mendon

- per poŝto al: Libroservo 37 RUE PIERRE ET MARIE CURIE  
VANDOEUVRE (uzante la ĉi-suban mendilon)

FR-54500

- per ret-poŝto al "**libroservo.efe@laposte.net**" - nur escepte per telefono: 06-77-90-49-61.

2. Vi baldaŭ ricevos la librojn kun fakturo (libroj + sendkostoj), pagenda (indikante faktur-numeron) ĉu per:

- franca ĉeko je "**Esperanto France Est**" sendita al la supra adreso

poŝta ĝiro al "**Esperanto France Est**" CCP 0 1997 72W NANCY"

- interbanka ĝiro al "**Esperanto France Est**" IBAN FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150

**BIC** PSSTFRPPNCY.

<b>Mendilo</b>		Bonvolu sendi tiujn librojn al apuda adreso:
S-ro / S-ino		
En	la	Subskribo:

**KATALOGO**  
**DE LA**  
**LIBROSERVO**  
**DE**  
**ESPERANTO**  
**FRANCE EST**



**2021**

Le libroservo est un service de Esperanto-France-Est, association loi 1901 enregistrée à la préfecture de Nancy et dont le siège social est 27 rue de la République 54000 NANCY / La libroservo estas servo de Esperanto-France-Est, asocio laŭ leĝo 1901, registrita en la Prefektejo de Nancio kaj kies sidejo estas 27 rue de la République 54000 NANCY.

Adresse postale / Adreso: Libroservo E.F.E. 37 Rue Pierre et Marie Curie FR-54500 VANDOEUVRE  
adresse courriel /retadreso: [libroservo.efc@laposte.net](mailto:libroservo.efc@laposte.net)

TITOLO	DATO	VERKISTO	PAGOJ	ELDONEJO	PREZO
<b>ANTOLOGIOJ / ANTHOLOGIES</b>					
Antologio de portugalaĵoj	1959	De Seabra	226	Scarrpa	3,00 €
Aŭstralia antologio	1988	Towsey	436	Edistudio	21,00 €
Ĉina antologio 1949/1979	1989	Opo	422	Ĉ.E.E.	9,60 €
Germana antologio	1985	Brodth	330	Bleicher	17,00 €
Nederlanda Antologio	1987	Opo	122	N.E.A	6,90 €
Slovaka antologio	1977		544	Slovaka Pedagogia El	9,00 €
<b>BILDSTRIOJ / BANDES DESSINEES</b>					
Cisko kaj Vinjo	2002	Vandersteen	60	Standaard Uitgeverij	7,00 €
Ĝeta Spiru' (la)	2005	Tome/Janry	48	Esperanto jeunes	9,00 €
Faraono (la)	1980	Prus	48	H.E.A.	3,00 €
Gastono 1	2005	Franquin	48	Esperanto-jeunes	8,00 €
Nenio plu estas kiel antaŭe	1997	Bilong	40	Billong	3,90 €
Templo de l' suno (la)	2012	Hergé	62	Casterman	12,50 €
Tinĉjo en Tibeto	2005	Hergé	62	Casterman	11,50 €
<b>BIOGRAFIOJ / BIOGRAPHIES</b>					
De Karlis al Carlo Rememoroj	2016	Nicolodi	92	Esperanto France Est	12,30 €
De paĝo al paĝo	1976	Tarkony	124	H.E.A.	5,50 €
Esperanto kaj vivo	2010	Samodaj	248	Impeto	19,00 €
Francisko Valdomiro Lorenz	2017	Novobilsky	160	Kava Pech	13,50 €
Georges Kersaudy	2015	Cherpillod	16	La Blanchetière	1,50 €
Heroo de amo	2005	Kraft	196	Kava Pech	12,00 €
Infantravivaĵoj	2006	Le Quint	36	Le Quint	4,00 €
Jak Farjon de la Gatinerie	2006	Harada	48	Harada	5,00 €
Konvinkakamufilaĵo	2014	Steele	272	F.E.L.	19,00 €
Lidia	2007	Heller	390	FEL	29,00 €
Li ne iĝis profeto en sia lando...	2018	Ludwig	26	Esperanto France Est	4,00 €
Rememoroj de centprocenta esperantisto	1993	Saĥarov	200	Impeto	6,60 €
Richard Wagner, liavivo, lia verkaro	2013	Cherpillod	146	La Blanchetière	12,00 €
Sciencisto,esp-isto,patro : Eŭgeno Bokarjov	2010	Bokarjova	144	Impeto	6,00 €
Sen laco por paco	2019	Chrdle	162	Kava Pech	15,00 €
Sub la norda lumo	1991	Brazdionyte	50	Panevezys	2,30 €
Vivo de Andreo Cseh	2003	Borsboom	320	I.E.A.	18,00 €
<b>DIVERSAĴOJ / DIVERS</b>					
Beletro, sed ne el katedro	1987	Waringhien	266	F.E.L.	15,20 €
Bibliografio de la publikaĵoj de Hauptenthal	1986	Hauptenthal	14	Illtis	1,50 €
Centa simio (la)	1984	Ken Keyes	138	Vision Books	3,00 €
107 krucenigmoj en Esperanto	2008	Marček	90	Marček	12,00 €
Decimala katalogo de planlingva Literaturo	1979	Wojtakowski	308	I.K.U.E.	6,80 €
Dek prelegoj	1985	Kalocsay	128	H.E.A.	6,80 €
Diskutlibro pri malpli uzataj lingvoj	2002	Strubbel	62	U.E.A.	7,50 €
Diverskoloro	2005	Steele	112	Sezonoj	10,00 €
Elĉerpaĵoj el la irlanda Literaturo	1996	O Cuire	28	E.A. Irlando	3,30 €
El verva vivo ĵurnalista	2005	Maul	270	F.E.L.	20,00 €
Enkonduko al literatura kritiko	1978	Silfer	52	Literatura foiro	7,60 €
Enprizonigo, krepusko de erao	2002	Barros Leal	152	Democrito Rocha	6,90 €
Eŭropaj legitimiloj	2011	Opo	10	Espero	0,50 €
Fratoj eble ni estas	1993	Seattle	34	Utovie	10,00 €
Fundamento de homaj rajtoj				U.E.A.	6,90 €
Homaj rajtoj : demandoj kaj respondoj	1998	Levin	142	U.E.A.	9,90 €
Instrua amuzo	1979	Marcek	58	Marcek	3,00 €
Interpopolakonduto	2006	Privat	144	Hejme-libro mondo	11,70 €
Islama respubliko (la)	1984	Hauptenthal	38	Illtis	2,70 €
Ĵurnaleto de Jocio Tempesto	2009	Edistudio	224	Vamba	18,00 €
Kaj kiu pravos	2002	De Zilah	362	Pro Esperanto	24,00 €
Kalejdoskopaj rememoroj	2007	Fernandez	216	F.E.L.	15,00 €
Karnavale	1999	Montagut	70	I.E.M.	9,00 €
Kio estas demokratio	2000	Beetam	144	U.E.A.	9,90 €
Krimeo estas nia	2015	Kalle Kniivila	154	Mondial	15,00 €
Libro de la amo	1977	Follereau	66	Gabrielli	6,00 €

TITOLO	DATO	VERKISTO	PAGĜOJ	ELDONEJO	PREZO
Lito apud la fenestro	1999	Salt	114	U.E.A.	4,80 €
Malamu vin unu la alian	2009	De Seabra	228	Mondial	16,50 €
Manlibro de la sendependa verkisto	2012	Kelmer	48	Impeto	5,00 €
Mi forgesis vin miaj arboj	2010	Leonczuk	228	Hejme	8,00 €
1111 anekdotoj en esperanto	2009	Borsky	11	Espero	7,50 €
Mio kaj lia pretero (la)	1973	Dun Karm	38	Malia	1,00 €
Morso klubo	1973	Fisker	34	D.E.F.	2,60 €
Nomoj	1999	Rosbach	78	F.E.L.	8,00 €
Nu, kaj do ?	2010	Rodin	160	Kluĵo	9,90 €
Petit guide 1 l'essentiel	2005			AEDIS	3,05 €
Pleure, O ma langue bien aimée !	2018	Cherpillod	120	La Blanchetière	6,00 €
Poeto fajrakora	1983	Boulton	152	Iltis	16,30 €
Por ke la tagoj estu pli lumaj	2008	Zamenhof Lidia	430	F.E.L.	24,00 €
Revenoj al Kryunki	2014	Janowicz	50	Swidnik	15,00 €
Sekreta miraklo (la)	2008	Borges	200	Sezonoj	18,00 €
Sub la signo de socia muzo	1987	Aŭld	128	F.E.L.	9,90 €
Tria ŝuo de Hruščov	1996	Macioszek	66	Edistudio	21,00 €
Unuan fojon (la)	2001	Opo	44	U.E.A.	4,20 €
Unuiĝintaj nacioj Venu kun mi !	2001	Annan	36	Izvori	7,80 €
Unu ringo ilin regas	2008	Korĵenkov	16	Sezonoj	3,00 €
Vastas la Mondo, Multas Laboro	1998	Woo-Choong	226	Shin Cheon JI	8,10 €
Verda relo (la)	1981	Opo	70	K.L.F	10,20 €
Verdeskaj Pensoj	2009	Handzlik	136	Kleks	6,00 €
Vikipedio por vi	2010	Van Dijk	64	Espero	4,50 €
Vojo al harmonio	2016	Karhan		Kava Pech	3,60 €
Vortoj de profesoro Th. Cart	1990	Grenkamp/Lajarte	144	Pro esperanto	5,00 €
Vortoj de Andreo CSEH	1984	Borsboom	212	Iltis	13,50 €
<b>(PRI) ESPERANTO / SUR L'ESPERANTO</b>					
Afero de espero	2007	Goes	88	U.E.A.	9,00 €
Akuzativo	1990	Moirand	338	F.E.L.	15,20 €
Albert Schramm kaj Zamenhof	1985	Haupental	62	Iltis	5,50 €
Al lingva demokratio	1998	Fettes	216	U.E.A.	10,20 €
Al nova internacia lingva ordo	2004	Lee-Chong-Yeong	240	U.E.A.	18,00 €
Asocio (la)	2008	Van Dijk	304	F.E.L.	24,00 €
Bona lingvo (la)	1997	Piron	118	IEM	12,00 €
Bonvenon en nia mondo	2009	Jensenius	128	Kava Pech	13,20 €
Bulonjo ĉe maro : la kongreso de 1905	2016	Cherpillod	62	La Blanchetière	6,00 €
Centra oficejo de U.E.A en vortoj	2002	Gbeglo	48	U.E.A.	4,80 €
Ĉu kultura integriĝo de Eŭropo ?	2008	Laube	32	Kava Pech	2,10 €
Danĝera lingvo (la)				U.E.A.	18,00 €
Elingita glavo	1962	La Laguna	150	Stafeto	3,00 €
Enciklopedieto de Esperanto	2015	Cherpillod	156	La Blanchetière	10,00 €
Esperante kaj ekumene	2004	Burkhard	370	Iltis	30,00 €
Esperanto : evoluo kaj degenero	2016	Cherpillod	62	La Blanchetière	4,50 €
Esperanto kaj mi	2007	Hory	208	Horizonto	10,50 €
Esperanto : la nova latino de la eklezio	2001	Matthias	146	F.E.L.	7,95 €
Espéranto, la plus facile des langues (L')	2008	Cherpillod	50	La blanchetière	4,80 €
Esperanto : lingvo-literaturo-movado	1988	Janton	120	UEA	6,00 €
Esperantologio Kajero 8	2018	Kiselman	70	Kava Pech	9,60 €
Esperantologio kaj ties disciplinoj	1979	Neegard	30	Iltis	2,70 €
Esperanto-movado (la),historio...	1996	Stop-Bowitz	96	Esperantoforlaget	7,60 €
Esperanto ou Babel: il faut choisir	1995	Cherpillod	30	Cherpillod	1,80 €
Espéranto, une valeur culturelle (I')	2005	Cherpillod	110	La Blanchetière	6,00 €
Eterna neologisma diskuto (la)	1987	Krammer	28	S. Hermagoro	3,00 €
Fotoalbumo fermiĝas (la)	2019	Steele	80	F.E.L.	7,00 €
Fotoalbumo (la) dua volumo	2005	Steele	166	I.E.M.	15,00 €
Fundamento de Esperanto	2007	Zamenhof	360	Edistudio	18,00 €
Gaston Waringhien	2000	Cherpillod	82	Cherpillod	8,70 €
Historio de esperanto	2005	Korĵenkov	128	Sezonoj	12,00 €
Ido, une jarcenton poste	2007	Cherpillod	46	La Blanchetière	5,00 €

TITOLO	DATO	VERKISTO	PAGOJ	ELDONEJO	PREZO
Intimaj temoj	2005	Chrdle	104	Kava Pech	9,00 €
Kaj la ceter' - nur literaturo	1983	Waringhien	354	Stafeto	18,00 €
Kompleta inventaro de la pasivaj participoj	1995	Schwartz	12	Iltis	2,40 €
Komuna Eŭropa Referenckadro	2007	Kovats	24	U.E.A.	2,00 €
Legendoj pri SEJM	2006	Bronstein	232	Impeto	15,00 €
Lingva arto	1999	Benczik	220	U.E.A.	16,50 €
Lingvaj aspektoj	1985	Migliorini	100	Edistudio	12,00 €
Lingvaj babilaĵoj	2005	Cherpillod	196	La Blanchetière	15,00 €
Lingvo kaj Vivo	1989	Waringhien	456	U.E.A.	12,30 €
Malédiction de Babel (la)	2011	Cherpillod	10	La Blanchetière	4,20 €
Monumente pri esperanto	1997	Rollinger	114	U.E.A.	8,00 €
Naturaj vortordoj en Esperanto	2008	Jansen	40	UEA	4,50 €
Ne kiel Meier!	1995	Schwartz	50	Iltis	3,90 €
Ordeno de la verda plumo	2006	Pleadin	274	Grafokom	33,00 €
Planned languages: from concept to reality	2001	Schubert	260	Vlekho	24,00 €
Por aktiva lingvo politiko	1999	Blanke	72	U.E.A.	7,20 €
Postdomo (la)	2003	Ertl	88	Bero	9,00 €
Pourquoi l'esperanto est facile	2011	Cherpillod	14	Cherpillod	1,50 €
Premio Miyoshi 2002	2002	Perspektivo	82	Sonorilo	9,00 €
Pri esperanta literaturo	1991	Privat	34	Pro esperanto	4,70 €
Pri esperanta literaturo	1990	Privat	30	Pro esperanto	2,35 €
Pri literatura kritiko	1984	De Diego	74	Iltis	7,50 €
Profesia uzo de esperanto	1995	Chrdle	42	Kava Pech	1,80 €
Raportoj pri la invitprojekto	2007	Hory	72	J..E.I.	4,80 €
Resumo de la teorio de Antido	1982	De Saussure	56	Iltis	5,20 €
Samideanoj	2006	Korĵenkov	80	Sezonoj	7,50 €
Sed homoj kun homoj	2005	Sikosek	202	U.E.A.	30,00 €
Servisto de l'ideo	2016	Jakob	120	F.E.L.	14,00 €
Skizo de la esperanta literaturo	2004	Tvarozek	92	Espero	6,00 €
Socia romano en esperanto (la)	1973	Vatré	20	K.C.E.	2,10 €
Tamen perdota	2012	Privat	10		2,00 €
Teknikaj kajeroj	1996	Ledon	20	Ledon	1,00 €
Terminologiaj konsideroj	2004	Werner	180	Kava Pech	15,00 €
Trois rêves humanistes du dr Zamenhof (les)	2007	Cherpillod	48	La blanchetière	5,10 €
UEA en konscio de Esperanto	2015	Galorz Zbigniew		Kava Pech	15,00 €
Une langue naturelle, démocratique...	2007	Cherpillod	80	La blanchetière	4,50 €
Une langue pour l'Europe	2003	Cherpillod	82	La Blanchetière	4,50 €
Universala Deklaracio pri la lingvaj rajtoj	2001	Martinelli	36	K.L.F.	8,00 €
Utila estas aliĝo	2008	Lins	128	UEA	15,00 €
Varsovio 1887		Lopez Luna			2,00 €
Vereco-distro-stilo	1981	Aŭld	106	Iltis	8,40 €
Vort-Statistikaj Esploroj	1986	Vatré	46	Iltis	3,60 €
Vort-Teorio en Esperanto	1982	De Saussure	94	Iltis	6,00 €
Zamenhof en Varsovio				U.E.A.	9,90 €
Zamenhof kaj judismo	1997	Cherpillod	64	Cherpillod	7,80 €
<b>FABLOJ-FABELOJ / FABLES-CONTES</b>					
111 fabloj de Krilov	1979	Krilov	144	H.E.A.	2,50 €
Fabloj	1985	Lessing	46	Iltis	4,50 €
Lorenaj fabeloj	2015	Philippe	122	Kava Pech	15,00 €
Mikromego kaj aliaj verkoj	2014	Voltero	216	Fonto	15,00 €
Ŝipeto narklo	2010	Ševčenko	56	Impeto	14,00 €
<b>FILOZOFIO / PHILOSOPHIE</b>					
Enkonduko en la kategorion de Aristotelo	1983	Porfirio	84	Fonto	4,20 €
Heraklito, la efezano	2019	Cherpillod	28	La Blanchetière	3,00 €
Katekismo de la honesta homo	2012	Voltero	66	La Blanchetière	6,90 €
Kiel la homo ekis pensi	2012	Gudskov	288	Impeto	18,00 €
Classique actuellement au Purgatoire", ces lignes font "la critique cinglante de l'institution scolaire", selon l'historienne de l'art, mais contiennent également le fondement des idéaux d'Hector, en décrivant une école "utopique, qui se veut égalitaire et socialiste" - d'ailleurs, il quittera le collège Calvin en 1907 sans être diplômé. Universalité, fraternité, collectivisme et surtout égalité, voilà les thèmes qui guideront son action. Or, ces notions sont aussi à la base de l'espéranto, ce langage international imaginé par le Polonais Ludwik Lejzer Zamenhof au cours des années 1870 afin de véhiculer

un idéal de paix, de tolérance et de solidarité entre les hommes. Le jeune Hodler se passionne pour cette langue universelle. En compagnie de son ami et camarade de classe Edmond Privat, il approche le philosophe Ernest Naville, lequel avait "présenté et soutenu l'espéranto à l'Académie française des sciences morales et politiques en 1899". "On suppose qu'Hector Hodler a eu connaissance des écrits de Naville par son père, bien introduit dans les cercles culturels", avance Marine Englert. Les deux garçons créent un club de jeunes espérantistes, puis, en 1907, Hector prend la rédaction en chef de la revue "Espéranto" avant de fonder, l'année suivante, l'Association mondiale d'espéranto (UEA), dont il dirigera le siège à Genève. L'organisme est aujourd'hui établi à Rotterdam et compte des membres dans 120 pays. Avec l'UEA, le journaliste entend démontrer que l'idéologie ne vaut pas sans pragmatisme: "Un idéal qu'on ne peut pas réaliser, même en partie, est socialement voué à l'échec", écrit-il. Des services pratiques sont développés; durant la Première Guerre mondiale, près de 50.000 pièces de correspondance transitent par l'association afin de maintenir le contact entre les civils des pays belligérants.

### Admiration mutuelle

Si Hector Hodler n'est pas devenu artiste, comme l'espérait Ferdinand, père et fils poursuivent toutefois les mêmes buts. À la quête d'universalité par la peinture de celui-là, dont le pinceau s'efforce de montrer "la ressemblance entre les êtres humains", répondent les recherches d'une

compréhension entre citoyens du monde entier de celui-ci, d'après Marine Englert. Complexe, leur relation s'avère néanmoins empreinte d'admiration mutuelle. Dans ses jeunes années, Hector pose beaucoup dans l'atelier paternel, ce qui lui vaut rétribution. Il y apprend aussi à peindre, comme en attestent les huiles et dessins reproduits dans l'ouvrage. Ils font ensemble de la musique et la tuberculose qui frappe Hector en 1912 - une malédiction familiale! - exige de longs séjours à la montagne qui les rapprochent. Hector mourra à Leysin en mars 1920, à l'âge de 32 ans.

### Hector Hodler: une posture pacifiste.

Un magnifique ouvrage intégralement bilingue (français, espéranto) et excellemment bien illustré et documenté, consacré à la vie, la pensée et l'action d'Hector Hodler (1887-1920), vient de paraître aux Éditions Notari, Genève, dans la collection Hodleriana dédiée à l'étude de la vie, de l'œuvre et de l'époque du peintre suisse Ferdinand Hodler (1853-1918).

Ce livre, sous la direction de Marine Englert, après un avant-propos de Mireille Grosjean, Co-président de la Société Suisse d'Espéranto et de Manuel Güdel, Directeur des Archives Jura Brüscheweiler, nous propose une anthologie de textes de Hector Hodler et des essais de Marie Englert, Charles Heimberg, Christian Lavarenne et Uhlrich Lins. Traductions: Mireille Grosjean et Christian Lavarenne. Les annexes se composent d'une chronologie et d'un répertoire des textes d'Hector Hodler, d'une bibliographie et d'un index des noms.

La grande qualité des contributions et le choix méticuleux des textes d'Hector Hodler éclairent avec précision comment, fauché par la tuberculose à 32 ans, celui-ci réussit un engagement concret et créatif en faveur de l'espéranto, qui n'est pas dissociable de son engagement pacifiste, tout en restant proche de son père, Ferdinand Hodler, artiste-peintre mondialement connu. Ce dernier voulait faire de son fils un artiste-peintre, mais il laisse Hector faire son chemin, et même le soutient, tout restant en lien avec lui sur le plan de la peinture.

Dans son texte, "La Grève", rédigé en 1902, le jeune Hector Hodler exprime son intérêt pour les questions sociales et les conditions de vie des classes laborieuses. Il termine son texte par: "... il y a l'homme qu'il faut respecter. Voulons-nous être hommes ou bêtes, libres ou esclaves? Les fondements intellectuels des luttes sociales passionnent véritablement le jeune écrivain et nourrissent son envie de contribuer à la fondation d'une société plus équitable.

Dans "Autrefois et aujourd'hui", vers 1907, Hodler se prononce sur les questions éducatives. C'est un texte surprenant, amusant, critique et imaginaire. Il propose de remplacer les professeurs par des phonographes. Mais au-delà de la révolte contre le système scolaire, son essai contient surtout des concepts clés de sa pensée. Il évoque les notions d'universalité, de fraternité et surtout d'égalité.

Ces concepts font largement écho à la pensée de Zamenhof, que la pratique de l'espéranto devait concrétiser. En effet,

bien que certains espérantistes considèrent l'espéranto uniquement comme une langue, son fondateur y voit un moyen de véhiculer un idéal de paix, de tolérance et de fraternité. Hector Hodler s'inscrit clairement dans cet état d'esprit, car il est évident que sa propre évolution au sein du mouvement espérantiste s'accompagne de réflexions et d'actions visant à améliorer la solidarité et la communication entre hommes et femmes de tous horizons par-delà les frontières nationales, ethniques et religieuses.

Ferdinand Hodler convaincu que l'artiste a une mission est revenu souvent sur la notion d'unité qui doit régir l'agencement des éléments dans ses œuvres afin de provoquer chez le spectateur une harmonie de sentiment qu'il qualifiera plus tard de parallélisme moral. Il partage ainsi l'idée de Tolstoï qui développe l'idée selon laquelle l'art est comme "un moyen d'union parmi les hommes, les rassemblant dans un même sentiment". Tolstoï a également soutenu l'espéranto en tant que langue ayant une capacité unificatrice, car en effet elle est bien aussi un moyen de rassembler les hommes dans un même sentiment.

Ferdinand Hodler cherche à convaincre son fils que l'art est plus efficace que l'espéranto pour lier les êtres humains de tous horizons. L'idée d'unité était essentielle pour le père comme pour le fils et tous deux étaient conscients de la valeur que ce concept avait pour l'autre. Les figures intellectuelles, les combats sociaux et l'actualité qui alimentent les réflexions de l'un animent parallèlement la vocation de l'autre. Bien qu'ils n'aient pas toujours été d'accord, Ferdinand Hodler et son fils ont partagé une même vision de l'être humain et de la société. Ils se sont voués corps et âme à leurs engagements tout en se portant une admiration sincère et justifiée.

Hector Hodler s'engage pour l'espéranto, dès le collège avec son ami Edmond Privat, il fonde une revue destinée aux jeunes espérantistes. Il publie en 1905 la traduction en espéranto d'un roman. En 1906, Hodler participe activement à l'organisation du 2<sup>e</sup> Congrès Universel d'Espéranto qui se tient à Genève. En 1906, il acquiert la revue Esperanto, périodique dont il assure la rédaction jusqu'à sa mort.

Les espérantistes ne disposaient pas encore d'une organisation internationale. Les dirigeants français en empêchent la concrétisation. D'autre part le schisme dû à l'apparition de l'ido mobilise les esprits. Hodler évite de s'impliquer dans la rivalité des dirigeants en place et fonde en 1908 l'Association Universelle d'Espéranto (Universala Esperanto-Asocio, UEA) qu'il dirige durant le reste de la vie.

Hector Hodler avait pour objectif de mettre sur pied une association "dont le but est la facilitation de toutes sortes de relations entre des personnes de langues différentes et la création d'un lien solide de solidarité entre ses membres". Cette organisation, dont la taille importe peu à Hodler, doit avant tout fonctionner simplement, démocratiquement et à bon marché. L'UEA rassemble des membres toujours plus nombreux (plus de 7000 en 1914) et bénéficie d'un réseau de délégués de plus en plus étendu.

Hector Hodler considère comme une dépassée la tendance consistant à présenter l'espéranto comme une langue utile dans le futur, c'est-à-dire quand le monde l'aura acceptée. Opposant à cette attitude les avantages de l'espéranto pour le présent, il en prône l'emploi immédiat. La création de l'UEA vise à répondre à ces objectifs. Hodler était toujours caractérisé par un désintérêt envers toutes sortes d'approbations superficielles et cérémonielles et il s'énervait souvent au sujet de ce côté théorique et prosélyte de notre mouvement. Hodler déclare plusieurs fois que les espérantistes ne doivent pas courir après les gouvernements, mais qu'ils doivent tenter par leurs actions de provoquer l'intérêt de ceux-ci.

La création de l'UEA, selon Hodler, met donc en évidence le passage du prêche à la pratique-l'étape de l'espérantisme "qui prend naissance et existe par ses propres forces" Hodler avertit notamment: "Un idéal qu'on ne peut pas réaliser, même en partie, est socialement voué à l'échec". Hodler ne limite pourtant pas son action à des questions pragmatiques, mais il dote aussi le mouvement d'une idéologie. Il définit l'espérantisme comme un mouvement avant tout social, constructif et progressiste, qui réunit les êtres humains en développant en eux un sentiment de solidarité par la communication de manière équitable et égale, quelle que soit leur langue, leur nation, leur opinion.

La jeunesse d'Hector Hodler se situe dans une période qui a été appelée la "Belle Époque" à l'échelle européenne. C'est un moment de triomphe de la bourgeoisie et de ses idéaux de progrès que la question sociale et la marche à la guerre résultant progressivement de l'affirmation des États-nations sont venus ternir. À bien des égards, ce sont ces deux écueils que le mouvement espérantiste cherche à conjurer si l'on s'accorde à penser que les nationalismes, la mésestimation des peuples et surtout la guerre contrarient fortement et fondamentalement l'accès des plus démunis à des droits sociaux et à une vie meilleure.

Il existe de nombreuses manières de s'engager pour défendre ses idées. Hector Hodler a été une de ces personnalités qui a su concrétiser ses idéaux par des actions: la mise en place de structures telle que l'UEA ou, pendant la Première Guerre mondiale, le service de correspondance entre citoyens de pays hostiles et la livraison de nourriture, de vêtements et de médicaments.

Ces options et ces actions humanitaires sont accompagnées de réflexions profondes qu'il diffuse dans la presse. Bien que la fin de la guerre ne soit pas en vue, il insiste en janvier 1915 sur l'idée que les espérantistes "se doivent d'être l'embryon de ces élites futures" après la guerre ils rebâtiront le monde, un monde de paix, "non pas cette paix que les diplomates mentionnent dans des traités éphémères, mais cette paix qui se grave dans le cœur des hommes. » Hodler rédige un traité sur l'organisation pacifique des peuples, dont seuls certains passages ont été publiés.

Hodler traite alors les problèmes fondamentaux de la vie internationale. Il critique ceux qui ne se concentrent pas sur la lutte contre le système dont découle la guerre, contre "l'anarchie entre les États", c'est-à-dire la situation chaotique et belliqueuse qui régit le monde. Hodler parvient à ses conclusions après de subtiles analyses dans lesquelles il se montre capable de faire la distinction entre des facteurs

différents, mais reliés dont il faut tenir compte dans le domaine de la politique internationale.

Hodler insiste assez tôt sur l'idée que, pour effectuer une transformation fondamentale des relations internationales, il ne suffit pas d'établir de nouvelles règles de droit. Selon lui, de telles règles n'auront aucune efficacité si l'on n'opère pas en même temps une transformation de l'esprit des hommes: Les plus belles constructions théoriques d'un fédéralisme international resteront lettre morte tant qu'il manquera à la partie active de l'humanité un esprit ouvert sur l'international en appliquant les principes de compréhension réciproque et de tolérance.

Après Hodler, l'UEA n'a pas continué fidèlement dans la direction esquissée par son fondateur. Les espérantistes ont accepté avec reconnaissance l'héritage de l'argent que Hodler a légué par testament à l'UEA, sans reprendre ses idées. Après 1920 jusqu'à la Deuxième Guerre mondiale (1939-1945), un conflit encore plus violent et encore plus mortifère, l'UEA est paralysée par une neutralité mal comprise face aux nationalismes et au fascisme.

L'UEA, refondée en 1947, a déclaré son respect de la Déclaration Universelle des Droits de l'Homme et initié une collaboration avec l'UNESCO. Il s'agit de construire la paix dans l'esprit des hommes et des femmes. Entre-temps il a été pris conscience de la nécessité d'introduire l'internationalisme dans la vie quotidienne. Après la Seconde Guerre mondiale, l'UEA est devenue plus sensible aux implications politiques, sociales et intellectuelles dans son action pour l'espéranto.

Hector Hodler a légué sa revue "Esperanto", sa bibliothèque et un quart de sa fortune à l'UEA. Aujourd'hui elle reste la principale organisation mondiale du mouvement Espéranto, son organe officiel est toujours la revue Esperanto, et la bibliothèque constamment enrichie depuis, nommée "Biblioteko Hector Hodler", est toujours accessible au siège de l'UEA à Rotterdam et constitue la plus vaste collection d'ouvrages dans le mouvement espérantiste.

Les idées de Hodler restent trop peu connues y compris parmi les espérantistes, bien qu'ils utilisent beaucoup les services qu'il a lui-même créés. Les espérantistes ne sont pas toujours conscients qu'Hector Hodler n'a pas seulement défini l'action pour et par l'espéranto, mais il a aussi produit un ensemble de textes qui restent actuels, révélant un éminent penseur, et qui analysent les causes des guerres et les moyens de les prévenir. Espérons que le livre, dont le contenu vient d'être présenté, incitera à la découverte et à l'étude de la pensée et des écrits d'Hector Hodler.

Il est indispensable de remercier et de distinguer tous ceux qui ont contribué à la réalisation de cet ouvrage de référence. Ce livre est remarquable, beau, dense, précis, complet, agréable à lire. Les textes et les traductions, en français et en espéranto, sont irréprochables.

Ce livre protéiforme, mais parfaitement accessible à tous, tout en étant de haute tenue littéraire, artistique et historique, intéresse l'amateur d'art, de littérature, d'histoire ou de philosophie humaniste, le linguiste, le politologue, l'étudiant en sciences humaines et bien-sûr l'espérantiste novice ou chevronné. Aux novices, à qui je recommande tout particulièrement cet ouvrage, je partage mon expérience et ma conviction: nous n'apprenons pas l'espéranto, c'est l'espéranto qui nous instruit. Ce sera encore le cas en lisant ce livre, même si en première lecture vous ne lisez que les pages en français. Enfin restez libres: lisez les textes dans l'ordre qui vous convient.

Bernard Behra

Hector Hodler, Une posture pacifiste / Pacisma sinteno,  
Dir. Marine Englert,  
Éditions Notari, Genève, 2020, 229 p., 19 x 25 cm ISBN 9782940617388

## Vicprezidanto de ISAE: “La angla venkis” de Redakcio je 2021-01-15 en kulturo, movado

La suba artikolo estas kopiita en la retpaĝoj de Libera Folio <https://www.liberafolio.org/2021/01/15/vicprezidanto-de-isae-la-angla-venkis/>

Nia redakcio opinias, ke ĝi indas je kiel eble plej vasta disvastigo cele al diskutado kaj eble ĝi iĝos iela mejloŝtono en la disvastigo de Esperanto. Nin interesus la opinio de niaj gelegantoj.

La angla lingvo jam plene triumfis en scienco, kaj ne havas sencon publikigi sciencajn esplorojn en Esperanto. Tial estas nur logike, ke estis malfondita la Sanmarina Akademio Internacia de la Sciencoj, diras Wendel Pontes, vicprezidanto de Internacia Scienca Asocio Esperanta, ISAE.

Wendel Pontes estas brazila biologo, fakulo pri la konduto kaj reproduktiĝo de insektoj. Kiel universitata profesoro, li respondecas pri laboratorio, faras sciencajn esplorojn, instruas pri zoologio kaj scienca metodo.

Aldone, li estas esperantisto ekde la jaro 1995, kaj ekde 2017 vicprezidanto de ISAE, Internacia Scienca Asocio Esperanta. En oktobro li faris publikan retan prelegon kun la titolo “La fiasko de Esperanto en scienco”, en kiu li konvinke argumentis, ke ne havus sencon publikigi sciencajn esplorojn en Esperanto.

Post kiam iĝis ĝenerale konate, ke estis malfondita la Sanmarina Akademio Internacia de la Sciencoj, ĉar “fiaskis la ideo konvinki oficialajn instancojn, ke eblas universitat-nivela instruado en Esperanto”, ni petis lin komenti la staton de la aferoj.

Wendel Pontes, vicprezidanto de ISAE.

**Libera Folio: En oktobro vi prelegis pri la fiasko de Esperanto en la scienco. Ĝus iĝis vaste konata la malfondo de la Sanmarina Akademio Internacia de la Sciencoj. Ĉu tio pruvas vian tezon?**

**Wendel Pontes:** – Parte jes. Pro la nuntempa funkciado de scienco, kiel mi detalas en mia prelego, fari bonan sciencon estas multe pli grava ol disputi kiu estus la plej taŭga lingvo por publikigi sciencajn rezultojn. Kaj nur pere de publikigo de originalaj sciencaj eltrovaĵoj scienco evoluas. Kiam mi parolis pri fiasko, mi pensis pri tiuj originalaĵoj.

– Simple ne valoras la penon publikigi tiajn sciencajn eltrovaĵojn en esperanto (aŭ en alia malgranda lingvo), ĉar la limigita kvanto de legantoj kondamnos ĝin al malapero. Se alia sciencisto faros la saman eltrovon, kaj publikigos ĝin en anglalingva vaste konata scienca revuo, li fariĝos la “patro” de la ideo. Tiu kiu publikigis unue, tamen en malgranda obskura revuo, simple perdiĝos. Tio okazis kun Gregor Mendel, kaj okazas ĝis hodiaŭ. Nuntempe, se sciencisto publikigas en nekonata scienca revuo, li detruas sian propran sciencajn karieron.

**Dum multaj jaroj esperantistoj strebadis montri, ke Esperanto estas plenalvalora lingvo, kiu taŭgas por ĉiaj celoj, ankaŭ sciencaj. Ĉu la malsukceso signifas, ke Esperanto kiel lingvo efektive ne taŭgas?**

– Ne, la malsukceso ne signifas tion. Fakte, ankaŭ mi opinias ke Esperanto estas taŭga por ĉiaj celoj. La

fiasko temis ne pri la lingvo mem, sed pri la hodiaŭa aspekto de scienco.

– En la komenco, ne estis granda malutilo al sciencisto dediĉi parton de sia tempo al publikigo de esperanta scienca artikolo, kiel ideologia klopodo antaŭenigi la lingvon. Sed hodiaŭ la scenaro tute ŝanĝiĝis. Publikigo de sciencaj artikoloj en Esperanto en la pasinteco baziĝis sur la ĝenerala kompreno ke la ekzisto de fakvortoj estas esenca por ke oni faru sciencon en tiu lingvo. Sed sen sciencistoj por antaŭenigi la fakon, ne gravas kiom da fakvortoj ekzistas, ĉu? Kaj tio estis la granda manko en Esperantujo, kiel mi montris en mia prelego.

**Se la problemo ne temas pri Esperanto kiel lingvo, kial do okazis fiasko?**

– La fiasko de Esperanto estas sama kiel la fiasko de aliaj naciaj lingvoj, kiel la portugala, ekzemple. Hodiaŭ

nia landa scienca asocio ne plu publikigas sciencaĵojn en la nacia lingvo. Por ke la scienca revuo fariĝu videbla kaj alirebla al multaj aliaj sciencistoj eksterlande, ĝi fariĝis anglalingva, ĉar estas la lingvo regata de la plejmulto el la sciencistoj kiuj potencie povus interesiĝi pri la enhavo de la revuo. Sciencaj revuoj kaj sciencistoj devas fariĝi konataj en

sia fako, kaj se ili devas skribi en la angla por atingi tiun celon, tion ili faru.

**Ĉu tio signifas, ke ankaŭ ĉiuj aliaj lingvoj krom la angla perdas sian signifon en scienco?**

– Por originala scienco, jes. Scienco evoluas pere de konstanta disvastigado de siaj eltrovoj (la sciencaj artikoloj) inter samfakuloj ĉie en la mondo. Kaj nuntempe en la plejmulto el la grandaj respektataj laboratorioj, ĉiu sciencisto almenaŭ iom scipovas la anglan. Do sciencaj revuoj en la angla havas pli grandan eblon esti konataj kaj trovataj de la internacia scienca komunumo ol revuo kiu publikigas nur en la rusa aŭ en la japana. Scienco fariĝas pere de konstanta interŝanĝo de informoj de la sciencistaro. Anstataŭ pensi pri lingva justeco, sciencistoj preferas studi la lingvon kie troviĝas la informoj de ilia fako kaj produkti sciencon. Estas pli rapide kaj pli efike.

**Ĉu finfine do la angla jam iĝis la internacia lingvo, kaj okazis la fina malvenko de Esperanto?**

– Jes, rilate al scienco la angla triumfis. Sed tio ne estas la fina malvenko de Esperanto, nek de aliaj lingvoj. Malgraŭ ke la angla gravas por disvastigi originalajn sciencajn novaĵojn inter fakuloj, estas necese ke scienco estu popularigata al ĉiuj branĉoj de la socio. Ĉefe en la hodiaŭa momento, kiam oni atestas la kreskadon de kontraŭsciencaj konspirteorioj kaj pseŭdosciencaj ideoj. Popularigsciencaj prelegoj, podkasto, videoj, blogaĵoj, estas ege gravaj en ĉiuj lingvoj, inkluzive en Esperanto.

**Vi mem estas vicprezidanto de ISAE. Kian rolon havu ISAE kaj similaj organizaĵoj, se jam evidentas, ke Esperanto fiaskis en scienco?**

– Laŭ mia kompreno, tiaj asocioj devas investi tempon kaj energion por popularigi sciencon al la esperanta



komunumo. Tiel kiel estas scienco-popularigantoj en la angla, la hispana, la franca, la portugala, ankaŭ estu en Esperanto. Kaj la Esperanto-movado efektive faras tion, pere de prelegoj, seminarioj, blogaĵoj kaj jutubkanaloj. Tamen, estas forta manko de homforto por antaŭenigi la sciencan aferon, problemo kiu persistas de jardekoj, kiel mi klarigis en mia prelego.

**La organizaĵo de esperantistaj medicinistoj, Universala Medicina Esperanto-Asocio, iris alian vojon. Ĝi ne volas okupiĝi pri popularigo de scienco en Esperanto, sed ĝia revuo de jam pluraj jaroj aperas en la angla. Kion vi opinias pri tia elekto?**

– Tiu estas interesa ekzemplo kiu parte konfirmas mian teorion. Eblis persisti pri *Medicina Internacia Revuo*, por ke ĝi havu rolon en la hodiaŭa scienca scenaro, rezignante pri la lingvo. Mi opinias ke estis tre kuraĝa decido, fakte la nura elektebla, por daŭre publikigi la revuon sen perdi ĝian sciencan aspekton. De Esperanto ĝi nur konservis la nomon kaj la fakton ke ĝi akceptas resumojn de la sciencaj artikoloj en Esperanto. Tamen, mi jam klarigis en mia prelego, kial eĉ tiuj esperantlingvaj resumoj ne kontribuas por diskonigi Esperanton en scienca medio.

## Morice Benin, amiko de nia lingvo, forpasis la 19 an de januaro

**Morice Benin ne estis Esperanto-parolanto. Sed li estis tutcerte en plena harmonio kun la celoj kaj idealoj de nia lingvo.**

Morice naskiĝis en Maroko en la jaro 1947. Junaĝe li vidis kantadon de Jacques Brel kaj tio tuj instigis lin provi sekvi similan vojon. Li vojaĝis al Marseille kaj neniam uzis sian reven-bileton.

En la 60-aj jaroj, la disk-eldonejo Barclay, kiu regis mondon de la aŭtor-kantistoj, rimarkis lin kaj proponis kunlaboradon sub kelkaj kondiĉoj.

Tre rapide, Morice rifuzis tiujn vojon kaj postulojn de la disk-eldonejo. Li elektis liberecon kaj eblecon krei sian arton ekster la tradiciaj produkt-kanaloj. Li mem do produktis siajn diskojn.

En siaj junaĝaj kantoj, li jam emfazis la homaran fratecon kaj la gravecon de la ekologiaj zorgoj.

En la jaro 1973 Morice kantis antaŭ pli ol 150 000 pacifistoj sur la Larzac-altenebenaĵo, por protesti kontraŭ la projekto de milit-bazo.

Kelkaj el liaj tiamaj diskoj estis eldonitaj je pli ol 100 000 ekzempleroj.

Dufoje, en 1982 kaj 1989, li kantis en la fama pariza spektaklejo "Olympia". Lia verko ricevis plurajn rekompencojn, kiel tiu de la "Académie Charles Cros" kaj de la Sacem...

Iom post iom, lia ribelo iĝis pli interna, lia stilo pli delikata, sen forlaso de liaj bataloj kontraŭ la stulteco de la homoj, kiuj tranĉas la viv-branĉon de sia propra arbo.

Ĉiam tamen daŭris lia furiozo kontraŭ la eksceso de la mondo, de la mono, kontraŭ la difektado de la natura medio hipotekante nian estontecon. Ankaŭ daŭris kaj eĉ grandiĝis la profundeco de lia poezio, lia fido je amo, al homoj, la simpleco kaj la varmego de lia amikeco, lia neforgesebla voĉo... Ĉio tio nun mankas al mi, al ni...

### Morice kaj Esperanto

Mi konas lin persone jam dum pli ol 20 jaroj. Kaj kompreneble, mi ofte parolis al li pri Esperanto.

Ŝajnis al mi evidente, ke liaj ideoj kaj tiuj de nia internacia lingvo iel kongruas.

De tiu konsciiĝo naskiĝis du projektoj, ambaŭ produktitaj kaj eldonitaj de Vinilkosmo: la disko "Inspir" en 2001 kaj la franclingva kanto "Esperanto ou tard", financata de SAT-Amikaro, en 2018.

Plurfoje Morice koncertis en Esperanto-medio. Inter alie, ankaŭ dum la jubilea Universala Kongreso en Lille.

La tagon antaŭ lia forpaso, li telefone parolis al mi pri siaj projektoj, pri nova libro, kiun li finkreis kaj kies aperon li bedaŭrinde, ne plu vidos.

Li forpasis, sed restas tiom multe da liaj kreaĵoj, pli ol 30 diskoj, libroj...

Gilbert Stammbach



*"Ĝi certe mortigos vin  
La Morto, la morto. . .  
Sed kion ĝi ne povos mortigi  
estas la spuro, kiun vi estos postlasinta"  
(Morice Benin "Infiniment" / "Senfine")*

## ABONOJ KAJ KOTIZOJ POR 2021 ĝis 2023

La abon-periodo 2020 jam finiĝis per la lasta numero 192. Ĉi-tiu numero 193 jam estas la unua de la jaro 2021. Ĝi estas la lasta sendita al ĉiuj malnovaj abonintoj. La venontan numeron 194 ricevos nur la abonantoj de la jaro 2021.

La adres-etikedo de via Informilo informas vin pri viaj pagoj. La unua linio antaŭ la adreso konsistas el la adreso-kodo, la abon-jaro, pago (A=abonanto, F=federacia membro, poste UFE ktp.) kaj eventuale pago por la sekvantaj jaroj 2022 - 2023

Se post via adreso troviĝas la mesaĝo "*Via abono estas finita, ni petas reabonon*", tio signifas, ke vi ankoraŭ ne pagis vian abonon al La Informilo por la jaro 2021. Tiam bonvolu ĝin senprokraste pagi laŭ la ĉi-suba tarifo. Vi trovos aldonitan abonilon je via nomo kaj koverton.

Krome nia asocio **Esperanto France-Est** havas la rajton atesti pri ricevataj donacoj aŭ kotizoj, dekalkuleblaj de viaj impostoj. La principo estas, ke eblas dekalkuli de la impostoj 66% de donaco aŭ kotizo al nia asocio. Se vi pagas tian kotizon aŭ pli, nia kasisto sendos al vi ateston, kiun vi povos aldoni al via imposto deklaro.

		Jaroj:	2021	2022	2023
		Abono por la papera versio:	18 eŭroj	18 eŭroj	18 eŭroj
		Abono por reta versio en formato pdf:	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj	7,5 eŭroj
		Federacia kotizo:	7 eŭroj	7 eŭroj	7 eŭroj
		Federacia kotizo kun atesto por viaj impostoj:	20 eŭroj	20 eŭroj	20 eŭroj
<b>UEA 2021</b>	MB	• Individua Membro Baza, kun reta aliro aŭ UEA-servoj: reta revuo Esperanto, Delegita Reto (reta jarlibro)			44 eŭroj
	MA	• Individua Membro-Abonanto: kun ĉiuj retaj servoj, kiu aldone ricevas la revuon <b>Esperanto papere</b>			74 eŭroj
Pag- manieroj	<b>1. Per ĝiro al la poŝtĉekkonto de nia Asocio:</b> <u>Esperanto France-Est CCP 1997 72W NANCY</u> Ne forgesu koncize mencii la celon de via pago sur la linio "mesaĝo" de via ĝirilo. La mencio de via adres-kodo faciligas la laboron de nia kasisto:				
	<b>2. Per franca bankĉeko aŭ poŝtbankĉeko je la nomo de:</b> <u>Esperanto France-Est</u> sendita al jena adreso: S-ro André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM, Francio Klarigu la celon de via pago, abono al La Informilo, kotizo, donaco al .... ktp por 2021, 2022				
	<b>3. Per internacia aŭ reta ĝiro</b> je la nomo de <u>Esperanto France-Est</u> kaj uzante la jenajn internaciajn kodojn: IBAN : FR45 2004 1010 1001 9977 2W03 150 BIC : PSSTFRPPNCY (Ne forgesu mencii la celon de via pago kaj vian adres-kodon)				
	<b>4. Al UEA-konto de TAKE ekat-i</b> (menciu la celon de via pago kaj vian adres-kodon)				

Libroj eldonitaj de Esperanto France-Est aŭ akireblaj ĉe nia kasisto

### "De Karlis al Carlo Rememoroj"

Kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi en malfacila periodo de la dua mondmilito, de Latvio al Italio, filo de Esperanto-paro, latva kaj itala.

12 + 4,24 = 16,24 eŭroj

### Momerige al Roger Imbert (1938—2009)

Li ne iĝis profeto en sia lando (Francio) sed eminenta esperantisto en Zagrebo (<kroatio)

4+2,12=6,12 eŭroj

### Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)

Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana fare de E.Ludwig

1,50 + 2,12 = 3,62 eŭroj

Knabaj petolaĵoj Poemoj de Gérard LESER en la alzaca,

tradukitaj al Esperanto de E. Ludwig

1,50 + 2,12 = 3,62 eŭroj

La harplektaĵo de Sylvie Reff Poemoj en alzaca

kun traduko al Esperanto de E. Ludwig

1,50 + 2,12 = 3,62 eŭroj

### Etaj rakontoj pri al Katedralo de Strasburgo

Ĝin verkis kaj kompilis Sŭzel PAILHES. Ĝi aperis en 12 lingvoj. En la Esperanto-versio an-

kaŭ aperas la hispana kaj la rusa lingvoj, 48-paĝa libro kun tre solida kovril-paĝo

12 + 8 = 20 eŭroj

"Gardu vin, knabo!" Historiaj rememoroj de Armand Hubert dum la dua mondmilito.

1 + 2,12 = 3,12 eŭroj



## Ni lernu per enigmo kaj humuraĵoj

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10
1										
2							■			
3					■			■		
4		■								■
5			■					■		
6							■			
7				■						
8		■					■			
9			■					■		
10						■			■	
11										■

G.J.

En juĝejo suspektita homo estas pridemandata..

*"Nu, vi pretendas esti senkulpa, tamen vi posedas revolveron...!"*

*- Estimata prezidanto, estimataj ĵurianoj, vi ĉiuj posedas ion, kiu ebligas al vi elfari seksatencon, tamen al neniu venus la ideo kulpigi vin pri tia fi-ago!"*

Maljuna paro vizitas ĉiu-jare ekspozicion pri aeroplanoj kaj helikopteroj. La edzo Arturo ja konfesas al sia edzino Elizabeta, ke li vere ŝatus sperti etan flugon per helikoptero.

Sed elizabeta diras: *"Mi scias Arturo, sed memoru ĝi kostas 60 eŭrojn. Tamen 60 eŭrojn."*

*En la sekvanta jaro la paro vizitas la saman ekspozicion."*

Refoje Arturo diras al Elizabeta:

*"Mi estas 85-jaraĝa, jen eble mia lasta ŝanco ĝui etan flugon per helikoptero..."*

*-Jen refoje vi ripetas saman deziron, tamen memoru Arturo, ĝi kostas 60 eŭrojn, jes vere 60 eŭrojn."*

La piloto, kiu aŭdis ilian konversacion:

*"Jen propono; vi eniru ambaŭ la aparaton, kaj tio senpage, kondiĉe, ke vi silentu dum la tuta flugo! Nur unika vorto nuligus mian proponon, kaj vi ŝuldu 60 eŭrojn!"*

Entuziasmitaj, la du maljunuloj instaligas malantaŭe. La piloto efektivas multajn akrobataĵojn, sed granda silento regas malantaŭe...

Je la alteriĝo, li alparolas Arturon, kiu eliras la unua kaj diras:

*"Mirinde! Mi estas vere impresita! Tiom da silento! Neniu vorto dum mia iom timiga flugo!"*

### HORIZONTALA:

1. Fama patogena agento.
2. Radioaktiva metal'. Vira vest'.
3. Duoninsul' en Grekio. Litera nomo. Kapo de krabo.
4. Part' de la jaro.
5. Prépozicio. Gut', kiu elfluas de la okulo. Objekt'.
6. INVERSE: franca enlada milito (1648-1654). INV: have seksa inklinado pri iu.
7. Pustul'. Servist'.
8. Ŝirmilo por vizaĝo, uzata en karnavaloj. Sufikso.
9. Regnokodo de Britio. Tradicia rakonto pri la antikvaj dioj. Infuzada trinkaĵ'.
10. INV: vestaĵ' portita de ortodoksaj sacerdotoj. Litera nomo.
11. Spriritismo.

### VERTIKALE:

1. Tipografia signo.
2. Rongul'. Lirika poemo. INV: fiakr'.
3. INV: pozicio de iu, kiu estas sur seĝo. Enorma sen vokaloj. Peco de tuko.
4. Metalogriza blanka. Mamulo sen vosto nek kapo.
5. Kapo de vulpo. Adept' de histori-socia doktrino.
6. Preterit'.
7. Centro de kosmo. Kastrita taŭr'.
8. Vaz'. Interna. Unu' de elektra rezistanco.
9. Rita ag' de katolika Eklezio.
10. Argila ter'. Elasta ruband' servanta por streĉi la strumpojn.

Magiisto deziras dungigi en varia teatro.

*"Mi magias kun du kanguruoj... Ĉe la fino de mia prezentaĵo, ĉiu el la du kanguruoj saltas en la poŝon de la alia.*

*-Kaj kio okazas poste?*

*-Stranga demando, ambaŭ malaperas!"*

Nova estro estas sendita al la kapo de la firmao. Li alparolas siajn kunlaborantojn:

*"Gekolegoj, ne taksu min kiel ĉefon, sed nur kiel amikon, kiu ĉiam pravas!"*

En la firmao la estro demandas:

*"Diru al mi, sinjoro Arkoviĉ, kial vi malfrue alvenas al via laborĉambro?"*

*- Sed last-semajne, pro la sama motivo, vi ja konsilis al mi legi la gazeton hejme!"*

### SOLVO KVE 192:

#### Horizontale:

1. GASTEROPOD.
2. RIB. KEBEKO.
3. ADIP. STM.
4. MORALISTO.
5. ASONANC. PA.
6. TO. TR. EPOK.
7. TAMEN. DA.
8. KIALO. AM.
9. IRBE. BRAVE.
10. LOK. OLIM.
11. TRONOJ. TRI.

#### Vertikale:

1. GRAMATIKIST.
2. AIDOSO. IR.
3. SBIRO. TABLO.
4. PANTALEON.
5. EK. LARMO. KO.
6. RETIN.
7. OB. SCENARIO.
8. PEST. MALT.
9. OKTOPOD.
10. DOM. AKADEMI.

-Estimata direktoro, ĉu mi rajtas forlasi la oficejon du horojn pli frue hodiaŭ? Mia edzino deziras, ke mi akompanu ŝin por kune butikumi..

-Nepre malpermesata!

\* Koran dankon, sinjoro Direktoro, mi estis certa, ke mi povos kalkuli je via helpo!"

\*

"Ĉu vi aŭdis, ke nia direktoro forpasis!

- Jes, sed mi ŝatus scii, kiu samtempe forpasis kun li.

- Kial kun li?

- Mi legis en la gazeto.... kun la Direktoro malaperis unu el la plej kompetentaj kunlaborantoj!"

Viro al vendistino:

"Ĉu vi havas kandelojn? Mi deziras ornami la kukon por la naskiĝ-dato de mia edzino.

- Kiom da?

- Tridek, kiel kutime."

Kio estas la diferenco inter virino kaj hundo ?  
respondo: La prezo de la kol-ĉeno.

Komercisto kaj dungito

Komercisto, kiu ĵus dungis junulon por helpi lin en magazeno, klarigas al li:

"Nu! Komence, zorge balau la tutan butikon. ..

- Sed, malkonsentas la junulo, ne forgesu, ke mi studis, filozofion kaj ĵus ricevis diplomon pri filozofio.

- Mi pardonpetas, diras la komercisto, mi jam forgesis tion. Tiukaze, venu ĉi-tien, por ke mi montru al vi, kiel teni balailon! "

## Bonvenon! Laŭra kaj Petro malkovras Esperanton

Ne nur por junuloj, sed ankaŭ por ĉiuj esperantistoj aperis interesa libro, kiu en kelkaj paĝoj, bonege prezentas la fundamentajn karakterizaĵojn de Esperanto. Temas pri bone elpensita rakonto, fakte aventuro de junuloj, kiu nuntempe okazas. Gefratoj rakontas kiel ili malkovris kaj lernis Esperanton, fondis klubon, kaj praktikas, travivas tiun vivsperton. Ĉu lerno-libro? Ne vere, tamen la pedagogoj certe trovos rimedojn por uzi ĝin dum kursoj de Esperanto.

Federico Gobbo, kiu instruas en universitato, estis invitita prezenti Esperanton en mezlernejo al junuloj inter 11 kaj 14 jaroj. Por ilustriti tion, mankas libro de la nuna epoko, do io nova, freŝa kaj mojosa. La defio estis verki ion, kio montras trajtojn de la historio de Esperanto, elementojn de ĝia kulturo kaj kernojn de la humanismaj ideoj de Zamenhof. Tio ankaŭ ne estu teda, rigida kaj enua. Por plenumi tiun taskon Federico Gobbo konstruis interesan intrigon, situante ĝin en la nuna viv-stilo de bit-generacioj sen neniam perdi la fadenon por sukcese atingi siajn celojn.

La rakonto estas bonege subtenata dank'al la profesia (kun) laboro de Yuri Gamberoni, juna komiksisto kaj amiko de Esperanto. Nigrablanke desegnitaj, la bildoj bone esprimas la sentojn de scivolemo, miro, ĝojo, pripensado, amikeco. Interese ankaŭ estas la desegnaĵoj, kiuj memorigas en la rakonto mem la esencajn paŝojn de Zamenhof verkanta Esperanton. Iomete pli granda ol A5-formato la komikso mem ampleksas 50 paĝojn. La libro estas bela kaj agrabla, kaj ankaŭ aldonas tri paĝojn de desegnoj de Gamberoni, kiuj povus eventuale inviti la leganton provi esprimiĝi per desegnoj.

Federico Gobbo klare enkondukas la libron. Sed kio unuavide ŝajnas iom stranga estas, ke li proponas fine de tiu verko interesan eseon, kiu respondas al la demando: Ĉu estas subkulturo en Esperanto? Konsekvence tiu libro estas ne nur por komencantoj, sed ankaŭ por ĉiuj esperantistoj, kiuj

interesigas pri literaturo, komikso-arto kaj manieroj taksati la nunan efektivan ekziston de Esperanto. Tiu teksto de 11 paĝoj, estas ia "Esperanto en perspektivo". Malofte oni legas tiom bonan studon pri la aktuala situacio de Esperanto. Ĝi celas, konsiderante la faktojn, konsciigi pri la intereso disvolvi la komikso-arton en Esperantujo. Oni tamen rekomendu la libron al la junuloj por la komikso kaj oni invitu ilin legi la eseon iomete pli poste, kiam ili sufiĉe regos la lingvon!

La nocio de "subkulturo" ne implicas aĉigan prijuĝon, ali-dirite temas pri alternativaj vivostiloj al ĉefa vivstilo de priskribita socio, aŭ ia kontraŭ-kulturo, do aliaj manieroj konsideri, vivi, konsumi, ol tiuj de la plejmulto. La komikso-arto estas grava elemento de tiu rezistema subkulturo. Tradukoj de komiksoj kaj bildlibroj al Esperanto oni ofte eldonas. Originalaĵoj en Esperanto ekzistas, sed restas multo por fari, nome mankas originalaj mangaoj, tiuj tipaj japanstilaj komiksoj. La eseo konkludiĝas: "Komikso-arto estas la nuntempa plej bona kandidato por iĝi subkulturo de Esperanto, mankas nur iom da kuraĝo fare de la juna generacio por firmigi ĝin."

Tiu artikolo aperas ankaŭ en LME

Bernard Behra

Bonvenon! Laŭra kaj Petro malkovras Esperanton  
de Federico Gobbo kaj Yuri Gamberoni  
75 p. 15 x 23 cm Eld. Mondial Novjorko  
ISBN 978-1-59569-383-9



## Atlas sonore des langues régionales de France

La franca revolucio radikale batalis kontraŭ la dialektoj kaj lingvoj en Francio, inter aliaj la erudicia abato Grégoire! Se vi aŭskultas la diverslingvajn parolantojn en la suba sondokumento, vi komprenos, ke necesis promocii nacian komunikilon por regi la landon.

Kion oni tiam ne sciis, aŭ ne volis scii (ĉar ja nepris arigi tiujn diverslingvanojn en la limojn de la respubliko !) estas fakto, ke eblas lerni kaj paroli plurajn lingvojn. Esperantistoj tion ja scias!


Konsultu la suban dokumenton.

Noto: sub la mapo de Francio vi trovos la skriban version.

Frandu lingvojn! En Francio kaj en eksterlando !

<https://atlas.limsi.fr>


Une même fable d'Ésope peut être écoutée et lue en français (en cliquant sur Paris ) et en langues régionales (en cliquant sur les différents points de la carte). On peut retrouver les créoles et de nombreuses langues des Outre-mer, ainsi que ce qu'il est convenu d'appeler les langues non-territoriales de France, à partir de la carte du monde (en cliquant dans les rectangles qui leur sont consacrés) ou à partir des onglets correspondants. Les langues non-territoriales illustrées, comme le (r) romani et la langue des signes française (LSF ) sont celles envers lesquelles l'État reconnaît avoir une responsabilité patrimoniale. On peut aussi découvrir, dans le voisinage de la France, les langues et dialectes d'Italie, de Belgique, de Suisse, de la Péninsule ibérique et de l'Allemagne (Schlewig-Holstein).




**Espéranto:** Norda Vento kaj Suno disputis, kiu estas la plej forta, kiam vojaĝanto preteriris volvita en varma mantelo. Ili konsentis, ke, kiu unue sukcesos senigi la vojaĝanton de lia mantelo, tiun oni konsideru pli forta ol la alia. Do Norda Vento blovis per ĉiuj siaj fortoj, sed ju pli ĝi blovis, des pli la vojaĝanto envolvis sin en sia mantelo, kaj fine kompatinda Norda Vento rezignis. Tiam Suno brilis varme, kaj tuj la vojaĝanto deprenis sian mantelon. Tiel Norda Vento devis konfesi, ke Suno estas la plej forta el la duopo.

# Tra sezonoj kaj tra Eŭropo

Nia foto-paĝo



En Skovakio



En Belorusio:

Printempo en Alzaco

